


julio-aŭgusto 1970

63-a jaro

n-ro 776-7 (7-8)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 - rotterdam-3002 - nederlando - redaktoro: v. sadler



Labori per
Esperanto:
la plej
efika
reklamo!

Vi trovos

la akcenton en ĉi tiu numero je pli seriozaj temoj. La ĉefan spacon ni dediĉas (sur p. 108-111) al prilumigo, espereble definitiva, de la demando, ĉu Lenin favoris Esperanton. Same sciencan objektecon, kiel la artikolo de Ulrich Lins, celas la jam konata revuo de CED, "La Monda Lingvo-Problemo", kiun pritraktas denove nia ĉef-artikolo. Antaŭenigo de Esperanto nepre postulas komprenon pri la lingva problemo, aŭ pli ĝuste: lingvaj problemoj de la mondo, kaj ankaŭ, en ĉiam pli alta grado, pri la evoluo de la scienco kaj tekniko, kiu levas novajn problemojn kaj aliformigas malnovajn. La intervjuo kun grava funkciulo de Unuiĝintaj Nacioj (p. 106) povas helpi al tiu celo.

Aliloke aperas la ĉiujara resumo pri la rezultoj de la informagado en la pasinta jaro, kunmetita de la estrarano pri informado, s-ro Becker. Ĉi-jare ni kunligas ĝin kun la komenco de nova artikol-serio kun la celo plialtigi la nivelon de nia laboro sur tiu kampo. (p. 112-113).

Enhavo

- 105 La rolo de L.M.L.P. — por scienca pritrakto de la lingva problemo
- 106 Tuja monda komunikado: Persatelita televido (intervjuo kun J. Nichols en UN)
- 106 Lingvo-studoj maltrafas selon
- 107 Instruistoj preparataj en baltaj landoj
- 107 Pupteatra festivalo 1970: jam pli vasta
- 107 Kreskas la apliko de Esperanto en feriaj centroj
- 108 Lenin kaj Esperanto (Lins)
- 112 Por pli efika informado (Lapenna)
- 113 Raporto pri informado en 1969 (Becker)
- 114 Anonco (Philips)
- 116 Kie meti la limon — al esperantigo de nomoj? (Lienhardt)
- 118 Recenzo
- 118 Nekrologoj Butler, Rakuŝa, Balague, Hartog, Walker
- 119 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 120 Pri Kongresoj: UK en Vieno kaj Itala Kongreso sur ŝipo
- 120 Kalendaro
- 121 TEJO-paĝo
- 122 Esperanto en radio
- 123 Oficiala informilo n-ro 436
- 123 Antaŭ 50 jaroj
- 124 Anoncetoj

La kovrilo

La efektiva, internacia uzado de Esperanto dum la ĉiutaga vivo estas sen ia dubo la plej efika maniero por diskonigi la lingvon. Tion denove konstatis tripersona grupo ĉe privata lingva lernejo en Hamburgo, apud la universitato. Krom la ĉefo, kunlaboras du aliaj esperantistoj, japano kaj hispano.

Rezulte de tio, instruistoj kaj oficistoj de tiu lernejo interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis ĝin. Samtempe oni ne forgesas diskonigi Esperanton ankaŭ en la universitato.

La internacia interŝanĝo de personoj kaj migrado de laboristoj hodiaŭ ĉiam pli favoras la estiĝon de malgrandaj esperantlingvaj grupoj en ĉiutagaj laborejoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. **Fondita** en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo)

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; $\frac{1}{2}$ p. = 150 gld.; $\frac{1}{4}$ p. = 85 gld.; $\frac{1}{8}$ p. = 50 gld.; $\frac{1}{16}$ p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstre. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, p/a PEA, ul. Jasna 6, Warszawa 1, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

LA ROLO DE L.M.L.P.

por scienca pritrakto de la lingva problemo

La 1-an de januaro 1952 ekfunkciis la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies nuna nomo estas CED pri la Monda Lingvo-Problemo. Ĝia originala tasko estis kaj plu restas organizi esplorojn pri ĉiuj aspektoj de la lingva demando ne nur en internaciaj rilatoj, sed ankaŭ interne de unuopaj multnaciaj ŝtatoj, aŭ regnoj kun grandaj etnaj minoritatoj.

Agante konforme al la programo aprobita okaze de la fondiĝo kaj al ĉiujaraj planoj, tiu nia institucio plenumis efikan laboron, publikigis konsiderindan nombron da dokumentoj kaj liveris ampleksan objektivan dokumentaron en multaj kazoj (Montevideo, 1954; 100-jara Datreveno de la Naskiĝo de Zamenhof, 1959; Jaro de Internacia Kunlaboro, 1965-66; Jaro de la Homaj Rajtoj, 1967-1968, ktp.) al diversaj internaciaj kaj landaj instancoj. Pluraj gravaj dokumentoj de CED aperis en multaj naciaj lingvoj. Ekzemple, CED/7 aperis ĝis nun en deko da lingvoj kaj estas vaste uzata en plej diversaj okazoj. La dokumentoj de CED, eldonataj en la angla kaj kelkfoje en aliaj naciaj lingvoj, fariĝis tiel konataj en la mondo de specialistoj, ke daŭre oni petas ilin. Sciencaj disertacioj, intervenoj de deputitoj en parlamentoj en kelkaj kazoj, artikoloj en enciklopedioj, peticioj aŭ proponoj al diversaj internaciaj kaj landaj aŭtoritatoj estas ĉiam pli kaj pli farataj surbaze de dokumentoj de CED.

Fine de 1968 CED entreprenis novan gravan paŝon sur la kampo de sciencaj esploroj kaj dokumentado. En decembro de tiu jaro komencis aperadi la altnivela revuo "La Monda Lingvo-Problemo" (LMLP). La redakta komitato konsistas el monde rekonitaj specialistoj pri diversaj fakoj ligitaj al pluraj aspektoj de la lingva problemo: lingvistiko, antropologio, psikologio, filologio, leksikologio, terminologio. La ĉefredaktoro estas d-ro V. Sadler. Ankaŭ la kunlaborantoj estas konataj fakuloj en siaj respektivaj branĉoj.

Atingi decidajn mediojn

Eldonata de la mondfama Mouton (Hago-Parizo), sub la aŭspicio de CED, tiu periodaĵo liveras science prilaboritan materialon unuavice al institucioj kaj unuopuloj, kiuj troviĝas en decidaj aŭ gravaj pozicioj de la kultura vivo. La artikoloj estas verkitaj en diversaj naciaj lingvoj — depende de la deziro kaj bontrovo de la aŭtoroj — sed post ĉiu artikolo troviĝas ampleksa resumo en la Internacia Lingvo. En la unuaj 4 numeroj, ĉiu po 64 paĝoj, jam aperis abunda materialo. Pluraj resumoj estas tiel verkitaj, ke ili povus esti komplete publikigitaj en nacilingvaj tradukoj kiel memstaraj artikoloj. Ĉiuj ĝisnunaj recenzoj ĉu en Esperanto ĉu en diversaj nacilingvaj periodaĵoj esprimis sin tre favore pri LMLP.

En la unua jaro de sia aperado LMLP havis entute 586 abonantojn. Por tiaspeca altnivela revuo, kiu science pritraktas la lingvan demandon,

tio estas kontentiga. Des pli, ke inter la abonantoj troviĝas gravaj bibliotekoj, lingvosciencaj institucioj kaj similaj instancoj. Tamen, kun la helpo de ĉiuj seriozaj interesiĝantoj pri la problemoj traktataj en la revuo, la nombro de abonantoj povus kaj devus esti multe pli alta. Krome, ankaŭ la publikigitaj kaj publikigotaj materialoj facile povus esti utiligataj multe pli, ol ĝis nun. Lau la plano fiksita en 1968, la revuo aperados almenaŭ dum 4 jaroj, tiel ke la 4 jarkolektoj prezentos tuton, en kiu estos pritraktitaj ĉiuj ĉefaj aspektoj de la lingva demando. Por ricevi kompletan bildon necesas, do, aboni la revuon ekde la unua numero. La ĝis nun publikigitaj artikoloj ne nur ne malaktualiĝis, sed tutcerte restos aktualaj dum multaj sekvantaj jaroj.

Por pli efika utiligo

Por atingi kiel eble plej efikan utiligon de tiu unika periodaĵo, necesus agi laŭ la sekvantaj sugestoj:

1. Ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, precipe la landaj informaj fakoj, devus tuj aboni al LMLP, eĉ plurajn ekzemplerojn, kaj utiligi la publikigitajn materialojn por nacilingva informado. Preskaŭ ĉiuj resumoj, sed tute speciale kelkaj el ili, povus esti publikigitaj en seriozaj nacilingvaj fakaj periodaĵoj, kelkaj el ili eĉ en bonaj semajnaj aŭ tagaj gazetoj.

2. Necesas prizorgi, ke ĉiuj pli gravaj bibliotekoj, lingvistikaj institucioj, lingvosciencaj kaj filozofiaj fakultatoj, kaj similaj institucioj abonu al LMLP. Ne nur personoj laborantaj aŭ studentaj en tiaspecaj institucioj, sed ankaŭ ordinara vizitantoj de bibliotekoj povas peti, ke la koncerna instanco abonu al LMLP. Kutime tiaj petoj estas plenumataj. Necesas nur atentigi.

3. La komitatanoj kaj observantoj de UEA, la funkciuloj de niaj landaj, fakaj kaj lokaj organizaĵoj, fakte ĉiu persono, kiu deziras informiĝi pri la lingva realaĵo en la nuntempa mondo, devus konsideri la eblecon mem aboni al LMLP kaj utiligi la periodaĵon kiel eble plej efike konforme al konkretaj cirkonstancoj.

Grandegajn fortostreĉojn postulis la preparlaboroj, la prizorgo de bazaj financaj rimedoj, la formigo de la redakta komitato, la havigo de kompetentaj kunlaborantoj. CED atingis ĉion ĉi. Sed ĝi sola, sen la helpo de ĉiuj, kiuj komprenas la eksterordinaran gravecon de tia periodaĵo, ne povas atingi multe pli da abonantoj. De tiu helpo dependas, ĉu LMLP ludos tiun pozitivan rolon, kiun la legado kaj diskonigo de ĝia enhavo necese rezultigos, aŭ ankaŭ tiu jam preta materialo restos nesufiĉe kaj nekontentige ekspluatata. Oni povas nur esperi, ke, dank' al helpo de ĉiuj, LMLP atingos en tiu ĉi jaro kelkajn pliajn centojn da abonantoj, eble eĉ 2000, kaj ke ĝi troviĝos en ĉiu grava biblioteko en la mondo.

Prof. d-ro I. Lapenna

Tuja monda komunikado: Persatelita tele

**Intervjuo
kun
Josef
Nichols**

Sur la oka etaĝo, Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, mi intervjuis s-ron Josef C. Nichols, ĉefo de la Fakoj pri Internacia kaj Satelita Komunikado de la Divizio por Radio- kaj Vidoservoj. Laŭ naskiĝo polo, filo de diplomato, li frue kutimiĝis al vivo alilanda. Dum la dua monda milito, li oficis kiel signal-spertulo en la famaj aviadistaj grupoj, kiuj savis Britujon. Restinte tie, li finis la universitatajn studojn kaj printempe en j. 1947 fariĝis stabano de la Radio-Divizio de UN.

Nun 50-jara, mezalta, afabla, s-ro Nichols modeste kronikas multajn impresajn atingojn. Ekzemple, li starigis radioreton por pli ol 130 landoj en pli ol 30 lingvoj; prizorgis la disaŭdigon de la UN-Asembleo (1960) kaj usonan viziton de Papo Paŭlo (1965). Per satelitoj li estris pli ol 200 transsendojn al Eŭropo, Azio kaj Afriko. Mankas spaco por listigi la gravajn konferencojn, en kiuj li partoprenis kiel reprezentanto de UN. Alloga prelegisto, li ankaŭ verkis multajn artikolojn, ekzemple analizo de la soveta sistemo "Molnja" aperis en multe da teknikaj revuoj.

Kun edzino kaj tri gefiloj li nun loĝas en Bronxville, Novjorko, kaj ŝatas ĝardenumi kaj skiadi. La monde konata spertulo tre volonte respondis al miaj demandoj, ĉar li agnoskas la kreskantan gravecon de la Internacia Lingvo por tuja monda komunikado.

1) Ĉu vi povas per neteknikaj vortoj klarigi, kio kaŭzis la nuntempan senprecedencan evoluon?

— Rapidaj teknikaj progresoj intime rilatas al rivaleco en kosma spaco kaj modernaj militaj bezonoj, ankaŭ al la postuloj por rapidega diplomacia interŝanĝo de mesaĝoj. Anstataŭ presita vorto regas tuja viva vido kaj aŭdo. Deklaro en Vaŝingtono aŭdiĝas tuj en Moskvo, Parizo, Nov-Delio, Pekino. Komentoj simile tuj cirklas la mondon. Komercaj kaj personaj komunikoj uzas la

telefonon; junulo en kolegio telefonas al gepatroj, kaj komercaj kaj financaj mendoj devas esti sendataj NUN!

2) Kio nun eblas en tuja transsendo de sono kaj bildo?

— Nun teknike eblas ricevi vivajn bildojn kaj sonon de homo promenanta sur la luno; aŭdi voĉon de skafandristo el profunda marfundo; pli-grandigi la bruojn el steloj kaj galaksioj, kiuj alteriĝas po dekono de milionono de milionono de unu ŭato kaj transformi ilin en koherajn signalojn. Kuracistoj en Eŭropo povas observi "vivan" translokigon de koro okazantan operacie en usona malsanulejo. Post du jaroj, infanoj en vilaĝoj en Hindujo ricevos bazan edukadon pere de satelito. (Ĉu la maljunuloj tie aprobas la modernigon?)

3) Kion plu ni atendu?

— Estonte spektantoj en diversaj landoj povos ricevi televidajn programojn rekte el dissenda satelito, sen perado de terstacio, per kvinnumera ciferplato. La unuan numeron oni elektos por la kontinento, la duan por la lando, la trian por la urbo, la kvaran por la stacia "kanalo", kaj fine oni elektos la deziratan lingvon. La politikaj problemoj en tiu sistemo estas timindaj sed solveblaj.

4) Kiaj decidoj jam akceptiĝis en la multaj tre gravaj konferencoj pri "Telstar", "Intelsat", "Kom-sat" ktp.? Kiel statas la afero nun?

— Plejmulte la planoj de agado rilate al internacia komunikado estas diskutataj daŭre en la UN-Komitato pri Ekstertera Spaco, en la Internacia Telekomunika Unuiĝo (kiu kiel speciala organo de UN kontrolas kaj regas internaciajn komunikilojn) kaj en aliaj UN-subkomitatoj kaj labor-grupoj; inter ili, la Labor-grupo pri Senpere-elsendaj Satelitoj. Unesko studas la aplikon de modernaj

**Intervjuis:
Mark
Starr**

Lingvo-studoj maltrafas celon

Studado de fremdaj lingvoj en Usono estas jam ne plu konforma al la bezonoj de la lando. Tio evidentiĝas en la diskutoj okazintaj en la kvina japana-usona konferenco pri kulturaj kaj klerigaj interŝanĝoj, okazinta lastatempe en Tokio.

Nuntempe Japanujo estas la plej grava en transmara komerca rilato de Usono. Malgraŭ tio, 70-oble pli da usonaj universitataj studentoj studas la francan lingvon, ol la japanan. Eĉ la studentoj de la rusa lingvo estas 10-oble pli multaj, ol tiuj de la japana. Laŭ komento de Donald Shively, profesoro pri la japanaj historio kaj literaturo en la universitato Harvard: "Antaŭ cent jaroj Francujo estis eble 70-oble pli grava por Usono, ol Japanujo. Hodiaŭ tio ne plu validas."

Estas klare, ke la preferon por la franca kaj — en malpli alta grado — por la rusa kaŭzas ne la komerca aŭ kultura graveco de la koncerna lando, sed la relativa facileco de ĝia lingvo. Profesoro Shively taksis, ke por atingi saman lingvan nivelon necesas (por usona studento) duoble pli da tempo por la japana, ol por la rusa, kaj sesoble pli, ol por la franca.



Josef Nichols
estas altranga
fakulo de UN
pri komunikado.
Ĉi tiun
intervjuon li
permesis eks-
kluzive por
"Esperanto".



komunikiloj al amasedukado precipe rilate al sate-
litoj disaŭdigantaj programojn en Afriko, Azio kaj
Latin-Ameriko. Tiu ĉi laboro nur nun ekfunkcias,
kaj tro fruas nun por taksi ĝin.

Antaŭe s-ro Nichols anoncis publike la jenon: "Mi per-
sone kredas, ke kun la alveno de tuja globa komunikado,
la bezono de komuna lingvo fariĝos pli urĝa ol iam
antaŭe kaj ŝtatestroj devos fari iajn definitivajn aranĝojn."
("Sekretariat News", revuo por la personaro de UN, n-ro
aprilo 16, 1969).

**5) Kiun vi opinias la plej granda obstaklo kontraŭ
la alprenado de ĉi tiuj grandegaj teknikaj progresoj
— ĉu la politikan, socian, juran aŭ la tre gravan
lingvan?**

— La "homa faktoro" estas la plej granda ob-
staklo. Pacienca racia intertraktado povos venki
ĉiun politikan, socian kaj juran barilon. La ĉefa
bloko konsistas el la fortenco de establitaj intereso-
j, de mallarĝa naciismo kaj rezisto kontraŭ ia ŝanĝo.
Tiun blokon ni devas detrui. Lingva diverseco
ankaŭ grave baras liberan komunikadon inter la
ordinaraj popolanoj. Teknikistoj nun kreas inter-
nacion "lingvon" por la komputiloj. Ŝajne maŝinoj
povos "interparoli" unu kun la alia pli konvene
kaj libere, ol homoj! Ĉu tiu aliro ne iom eraras?

Instruistoj preparataj en baltaj landoj

Antaŭenmarŝas la enkondukado de Esperanto en
lernejojn de la sovetaj baltaj respublikoj. Por
prepari la bezonatajn instruistojn de Esperanto,
la ŝtata estona Instituto por Perfektigo de Peda-
gogoj aranĝas oficialajn Esperanto-kursojn por
pedagogoj en la ĉefurbo Tallinn, de la 15a ĝis la
30a de julio. La kursojn gvidas akademiano prof.
Paul Ariste.

Similajn kursojn aranĝis ankaŭ samspeca In-
stituto en Trakaj, apud Vilnius, Litovujo. La kursoj
daŭris de la 15a de junio ĝis la 10a de julio.

Jam per la ĝis nun disponeblaj instruistaj fortoj
povis dek unu estonaj lernejoj enkonduki la Inter-
nacion Lingvon dum la nuna lernojaro. La nombro
de lernantoj variis inter 9 kaj 26.

Pupteatra festivalo 1970: jam pli vasta

La Tria Pupteatra Internacia Festivalo en Esper-
anto estos jam konsiderinde pli ampleksa, ol tiu
de la pasinta jaro (vidu en "Esperanto", dec. 1969,
p. 183). Partoprenos ĝin pli ol cent pup-artistoj
apartenantaj al 11 pupteatraj grupoj el 10 landoj.
(Pasintjare alvenis ses trupoj el kvin landoj.) La
Festivalo okazos en Zagreb, Jugoslavio, de la 5-a
ĝis la 11-a de oktobro 1970.

La dek landoj reprezentotaj en 1970 estas:
Rumanujo, Ĉeĥoslovakujo, Portugalujo, Britujo,
Bulgarujo, Jugoslavio, FR Germanujo, Hungarujo,
Polujo kaj aŭ Gano aŭ Kanado. Enkadriĝis en la
Festivalo ankaŭ simpozio pri la temo "La peda-
gogia valoro de pupteatro", al kiu la organizantoj
petos la diverslandajn ministeriojn pri edukado
delegi reprezentantojn. Jom pasintjare reprezentiĝis
ĉe la Festivalo la Ministerioj de Kulturo de Ruma-
nujo kaj Slovakujo.

Kreskas la apliko de Esperanto en feriaj centroj


Ĉiam pli da libertempaj aranĝoj por Esperanto-
parolantoj estas ne iaj ekskluzivaj, fermitaj rondo-
j, sed parto de konstantaj aranĝoj vizitataj ankaŭ de
libertempantoj, kiuj ne scipovas la Internacion
Lingvon. La plej konata ekzemplo, verŝajne, estas
tiu de Primošten, en Jugoslavio. Koncentriĝo tie de
esperantlingvaj vizitantoj sendube havis gravan
influan al la aliaj uzantoj de tiu adria centro —
kaj krome estis plezura formo de informado!

Laste aperis anoncoj pri novaj libertempaj ren-
kontiĝoj per Esperanto en aliaj anguloj de Eŭropo:
ĉe Lahti en Finnlando kaj ĉe Balaruc les Bains

**Enkaŭ Esperanton eblas antaŭenpuŝi per
vizito al unu el la libertempaj centroj,
kie oni uzas la Internacion Lingvon...**

en Francujo. Nuntempe en multaj landoj ekzistas
konstantaj centroj, t.n. feriaj tendumejoj aŭ "vila-
ĝetoj", kie la vizitantoj povas ĝui trankvilan liber-
tempon en natura ĉirkaŭaĵo. Infanoj estas tie gar-
dataj kaj distrataj, dum la gepatroj ekskursas.
Ofte la organizantoj pagigas difinitan fiksitajn
sumon por la manĝaĵoj, kiujn oni rajtas ricevi en
kvanto laŭdezira.

En tiaj internaciaj centroj nur la lingva konfuzo
kaŭzas iom da nuboj. Plej ofte la instancoj ne
sukcesas dungi diverslingvan servistaron kapablan
interkompreniĝi kun ĉiuj vizitantoj. Tial la koncen-
triĝo de esperantistoj en difinitaj centroj kaj dum
difinitaj periodoj povas esti ne nur agrabla kaj
malmultekosta formo de libertempo sed povas
ankaŭ malfermi la okulojn kaj orelojn de organi-
zantoj, kiuj forte sentas la lingvan problemon sed
ne kapablas vidi ĝian solvon.



LENIN KAJ

Okaze de la centjaro de la naskiĝo de Lenin verkis

Ulrich Lins

En la numero de februaro 1969 (p. 24-27) ni publikigis "rememorojn" de Ints Ĉaĉe pri renkontiĝoj kun Lenin; en ili la fondinto de Soveta Unio prezentiĝas kiel simpatianto de Esperanto. Tiun artikolon, kiu aperis sub la respondeco de la aŭtoro, sekvis neordinare vigla reeĥo de legantoj, tiel ke nun — okaze de la centjaro de la naskiĝo de Lenin — ni povas resumi ĉiujn konatajn faktojn kaj argumentojn.

Pluraj legantoj atentigis, ke la asertoj de Ĉaĉe ne estas fidindaj, sed antaŭ ol prilumi tion, necesas konsideri, ĉu per la aperigo ni riskis — kiel riproĉas s-ro Keable (apr. 69, p. 66) — "ion, kio povas embarasi la laboron por Esperanto en Sovetio". Efektive, ne ni unufoje disvastigis la informojn de Ĉaĉe: Post liaj prelegoj antaŭ esperantistoj en Tallinn kaj la Akademio de Sciencoj en Leningrado, en novembro kaj decembro 1957, pluraj orienteŭropaj gazetoj, ne nur Esperantaj, disvastigis liajn asertojn, i.a. 'Nuntempa Bulgario', 'Zprávy', kaj 'Pola Esperantisto' (1-2/68) kredante "prezenti tute novan dokumenton, kiu preskaŭ sensacie atestas interesiĝon de Lenin" pri Esperanto. Ĉar en 1959 eĉ Soveta Informa Oficejo konigis dirojn de Ĉaĉe pri Lenin¹, ni celis per kritike komentita represio diskutigi pri la vero de asertoj, almenaŭ parte jam delonge akceptitaj de multaj esperantistoj.

☆

El du studentoj, kiuj en 1887 estis forpelitaj el la universitato de Kazan pro socialista aktiveco, unu, V. I. Uljanov, poste fariĝis revoluciulo sub la nomo Lenin, kreante la unuan prolet-kampanan ŝtaton; la alia, Sergej Feodoroviĉ Poljanskij, agadis por Esperanto (ĝis sia morto en 1935) kaj fondis en 1899 Esperanto-societon en Ĥabarovsk, la unuan en ekstrema oriento. La vojoj de ambaŭ ŝajne ne plu interkruciĝis, sed ni vidu, ĉu kaj ĝis kia grado estiĝis rilatoj inter Lenin kaj la Esperanto-movado.

Lenin en Krakovo

Pri la tempo antaŭ 1912 ne ekzistas eĉ onidiroj pri la temaro "Lenin kaj Esperanto". Sed, laŭ Ĉaĉe, en tiu jaro li deklaris dum la 8a UK en Krakovo, ke "Esperanto estas la latino de proleto".

Detala esploro havigis nenian pruvon por tiu eldiro². Kvankam Lenin troviĝis dum la kongresa semajno en Krakovo aŭ en Poronin, lia vivo tie estis tiel kaŝa, izolita kaj suspekteme observata de la aŭstraj aŭtoritatoj, ke ĝis 1913 li faris nenian publikan prelegon en tiu urbo.

Tamen, ni scias pri liaj regulaj kontaktoj kun almenaŭ unu elstara socialisto-esperantisto en Krakovo, d-ro Boleslaw Drobner, unu el la gvidantoj de la loka komitato de Pola Partio Socialdemokrata (PPSD) kaj vicprezidanto de la Krakova Asocio por Helpe al Politikaj Malliberuloj. En tiu asocio, kiu ebligis la restadon de Lenin en Krakovo, kunlaboris pluraj polaj kaj rusaj esperantistoj, i.a. prof. Odo Bujwid, kaj probable Lenin okaze renkontiĝis kun kelkaj el ili. Sed neniu transdonis iajn informojn, ĉu kaj kiel Lenin pensis pri Esperanto. Drobner, kiu pli frue renkontis Lenin jam en Svislando kaj kunorganizis la socialistajn programojn de la 8a UK, certe estus menciinta en siaj memuaroj ĉeeston de Lenin, kaj ankaŭ en la detala raporto de 'Internacia socia revuo'³ ne troviĝas aludo pri partopreno de elstara rusa rifuĝinto. Oni povas nur konjekti, ke Lenin eksciis pri la granda publika kunveno de socialistoj esperantistaj kaj neesperantistaj, organizita de PSD la 15an de aŭgusto 1912 kaj partoprenata de dumil homoj, aŭ pri la esperantlingva broŝuro 'Politika malliberulo', eldonita de la menciita asocio okaze de la Kongreso.

Kvankam s-ino Maria Hessel, vivanta en Krakovo de post sia infanaĝo, memoras, ke delonge ŝi aŭdis pri la vortoj de Lenin, ni ne povas konfirmi ilin, ĉar onidiroj, kiel konate, tre persiste konserviĝas tra la jardekoj.

Mitoj kaj faktoj, 1913/14

Laŭ informo de Instituto pri Marksismo-Leninismo en Moskvo, kiu nomis la materialojn de Ĉaĉe tute senbazaj, Lenin deklaris en prelego en Bern (somere 1913): "La revoj pri la arta kreo de internacia universala lingvo, de ia Esperanto aŭ Volapük,

1. "Paco", vol. 5. 1959, n-ro 64/65, p. 5

2. La sekvantaj informoj ni dankas unuavice al Marian Kostecki, Krakovo

3. Vol. 6. 1912, p. 105-108

ESPERANTO

Mitoj kaj faktoj pri la rilato de V. I. Lenin al la Internacia Lingvo cirkulas jam plurajn jardekojn. Post nia publikigo de "rememoroj" de Ints Ĉaĉe (en 1969), estis eble funde re-ekzameni ĉiujn disponeblajn informojn, opiniojn kaj onidirojn. La detale dokumentita, nova studo de Ulrich Lins (ĉef-redaktoro de la nova Enciklopedio de Esperanto) kredeble fariĝos la definitiva fonto pri tiu temo.

estas utopio. La lingvo de la estonta socio ne estos artefarita." Kiel fonton la Instituto indikis memorojn de Didrikil (1924).

Ĉirkaŭ tiu sama tempo, se oni kredus al Robert Payne⁴, Lenin serioze interesiĝis pri Eo, petante per leteroj al iu "Elizabet K." alsendon de 'Kompleta lernolibro por esperantistoj'⁵ kaj poste interrilatante kun esperantistoj en Zürich. Fonto de tiu ĉi aserto estas "memoroj" de la anonimulino, kiuj aperis en 1936 en Parizo, sed baldaŭ estis senmaskigitaj de iamaj kunbatalintoj de Lenin kiel ekstreme kruda falsajo. Kion ili kolportis per la elpensita amikino de Lenin, la esperantistoj sekve povas kalkuli al sia kolekto de kuriozaĵoj.

Niajn dubojn pri la informo de Ĉaĉe, ke Lenin uzis Esperanton en Brusela Konferenco en 1914, ni jam siatempe esprimis. Ni aldonu, ke la Instituto Emile Vandervelde, Bruselo, esploris en 1958, laŭ peto de SAT, siajn arkivojn kaj konkludis, ke Lenin uzis Esperanton dum neniuj kongreso de la Dua Internacio⁶.

Post la Revolucio

Ni transiru al tio, kion Ĉaĉe nomas propraj travivaĵoj. Li asertas, ke kiel teknika redaktoro de 'La agitanto' kaj 'Petrograda informilo' li ĉeestis en 1918 gazetarajn konferencojn kun Lenin. Sed efektive 'La agitanto' ekaperis, cetero dusemajne, nur en 1921, kiam Lenin delonge ne plu estis en Petrogrado; gazeto 'Petrograda Informilo' laŭ nia scio neniam ekzistis, dum ja tie aperis, sed same nur de post 1921, 'Esperanta informilo'. Pro la sama kialo la "historia renkontiĝo" de Drezen, Devjatnin kaj Ĉaĉe ne povis okazi en aprilo 1918 en Petrogrado, ĉar jam la 11an de marto la registaro transloĝiĝis al Moskvo⁷. Por substreki nian ĝustigon ni citu el letero de Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Latviaj Esperantistoj: "Kelkaj samideanoj el Leningrado, kiuj estis tie samtempe kun I. Ĉaĉe kaj bone memoras la tiamajn okazintaĵojn, intencis sendi al la redakcioj de niaj ĉefaj gazetoj averton pri la agado de I. Ĉaĉe."

Dum estas fakto, ke en junio 1921 okazis en Petrogrado la 3a Tutruslanda Esperanto-Kongreso (kun 160 delegitoj) kaj ke rusaj esperantistoj lanĉis internacian helpkampanjon por malsatuloj, ne

eblas supozi tie rektan influon aŭ iniciaton de Lenin. Estas same dubinde, ke en printempo 1918 la rusaj esperantistoj jam pensis pri tia agado. En tiu periodo de nestabileco kaj maltrankvilo, kiam eksterlandaj potencoj komencis invadi Ruslandon, Esperanto apenaŭ povis atendi seriozan pritrakton.

Pli kredindan ateston, nome ke Lenin eĉ ne pensis pri Esperanto dum la unuaj postrevoluciaj monatoj, liveris la posta urbestro de Stockholm, Karl Lindhagen. Okaze de akcepto ĉe Lenin en januaro 1918 li demandis: "Ĉu oni povas esperi ke la rusa registaro volas perfektigi la revolucion per propono ĉe la pactraktadoj kaj en sia ekstera politiko agi, por ke per internacia interkonsento estu akceptata mondlingvo, devige lernota en ĉiuj lernejoj de la mondo?" Lenin respondis: "Ni jam havas tri mondlingvojn kaj la rusa iĝos la kvara." Laŭ Lindhagen, Lenin "tute ne kredas je artefarita lingvo kaj argumentis same kiel homoj, kiuj ne okupiĝis pri la afero"⁸.

Kontraŭdiroj

Tamen baldaŭ, komence de 1920, disvastiĝis inter okcidentaj esperantistoj la onidiro, ke la sovetrusa registaro decidis enkonduki Esperanton kiel devigan instruobjekton en ĉiujn lernejojn. (La Popola Komisarejo por Klerigo efektive nur establis komisionon por studi tiun eblecon, kaj Lunaĉarskij en majo 1920 permesis fakultativan instruadon de Esperanto, egalrajte kun la franca, germana kaj angla.) La blufajn de kelkaj trofervoruloj dementis Maandblad juli-aug. stuk 6

la soveta gazetaro fine de 1921: "Opinii la lingvon Esperanto, kiel internacian lingvon, inda de ekskluziva registara atento, estas nun antaŭtempe."⁹

Sur miskompreno do baziĝas ankaŭ la aŭtoro dediĉo al Lenin, "protektanto de Esperanto", skribita en la broŝuro "L'espéranto. Langue auxiliaire, neutre internationale" de Léon Méras (Paris 1922), kiu estas listigita en katalogo de la libraro de Lenin kiel sola esperantaĵo.¹⁰

La veran situacion en la unuaj jaroj post la Revolucio kredeble trafe priskribis (en 1923) la ĉino Bao Pu, kiu studis en Moskvo: "La bolŝevikoj ne atentis problemon de internacia lingvo, nur pro tio ke ili ne ricevis ordonon de Lenin. Mi ĉiam disputis kun multe da bolŝevikoj, ili ofte respondis al mi per sekvantaj vortoj: 'Kial Lenin ne pensas pri Esperanto?' "¹¹ Kaj Lucien Laurat, kiu vivis en Moskvo de 1923 ĝis 1927 kaj estis membro de Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, skribis al ni: "La soveta esperantistoj de tiu tempo neniam faris al si iluziojn pri la sinteno de Lenin rilate al Esperanto. Li certe ne estis absolute malamika (laŭ ĉio, kion mi scias, li simple malatentis Esperanton kiel utopiaĵon), ĉar en tia kazo neniam Béla Kun estus kuraĝinta intertrakti kun

4. "Life and death of Lenin", New York 1964, p. 209-210

5. Fakte lernilo de Ido, de Anton Waltisbühl (Zürich 1908)

6. Camille Huysmans, internacia sekretario de la Brusela Internacia Socialista Oficejo, kiu multe korespondis kun Lenin, favoris Esperanton.

7. Ankaŭ Drezen kaj Devjatnin neniam skribis pri iaj elpaŝoj de Lenin favore al Esperanto.

8. Citaĵoj laŭ "Sennaciulo". 6, 1929/30, p. 211

9. "Sennacieca Revuo", 3, 1921/22, n-ro 5, p. 9

10. "Biblioteka V.I. Lenina v Kremle. Katalog." Moskva 1961, p. 650 (n-ro 8033)

11. "La Verda Lumo", (Ŝanhajo) 3, 1923/24, p. 6

Lenin kaj Esperanto

(daŭrigo de la antaŭa paĝo)

ni esperantistoj pri ev. rekono fare de Komin-tern¹²."

En rememoroj de Isaj Dratwer¹³ denove aperas la nomo de Lenin en ligo kun Esperanto. Dratwer renkontiĝis en vintro 1919-20 kun A. Postnikov, kiu prelegis pri sia projekto de "Universala Ligo" kaj montris numeron de 'Izvestija', enhavantan ordonon de Lenin pri "fondo de eksperimentaj internaciaj kolonioj fare de la Universala Ligo kun oficiala lingvo Esperanto". Konfirmon pri tio ni trovis nek en la laboristaj Esperanto-revuoj nek en 'Esperanto' de UEA, kiuj ĝenerale zorge registris Esperantajn eventojn en Soveta Ruslando kaj ja menciis registaran dekretan en Izvestija¹⁴ pri la disponigo de — ne longviva — Domo Esperanto al moskvaj esperantistoj. (Oni notu cetere, ke Postnikov, laŭ Drezen, fondema "aventuristo", poste estis arestita kaj kondamnita pro "ŝtatperfido".)

Alian epizodon raportis la hungara veterano Sándor Szathmári (mortinta; ne identa kun la verkisto!), kiu en 1925, deĵorante en Moldavio, renkontis eksterlandan esperantiston "kun letero propramane subskribita de k-do Lenin, en kiu li rajtigas tiun k-don disvastigi Esperanton en Sovet-unio".¹⁵

Laŭ Drezen, kontraŭe, la oficiala subteno al Esperanto inter 1917 kaj 1921 limiĝis nur al kelkaj "administrataj decidoj kaj agoj de lokaj ŝtataj kaj politik-partiaj aŭtoritatoj",¹⁶ kaj Gorkij, la intima amiko de Lenin, iom mistere supozis: "La unuajn jarojn post Oktobro ankaŭ ĉe ni oni provis malfermi larĝe la pordon al Esperanto. Sed ... io ekbremsis, iu ion ne prikonsideris, ien deflankiĝis."¹⁷

Nur post 1921, kiam fondiĝis Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU), la situacio komencis iom pliboniĝi, rapide kreskis la nombro de kursanoj, kaj de tempo al tempo la aŭtoritatoj subtenis la movadon, precipe inter 1925 kaj 1930. 'Pola Esperantisto' certgrade pravas, dirante: "Tutcerte pli frue en neniuj landoj Esperanto kaj esperantistoj estis tiel serioze kaj esperplene traktitaj, ol ĉi tio okazis en la gvidata de Lenin Sovetunio." Post la morto de Lenin la favoraj kondiĉoj daŭris ankoraŭ pli ol dek jarojn, ĝis sub la stalina personkulto, lige kun kreskanta malproksimiĝo disde Lenin kaj lia instruo, la Esperanto-movado estis komplete frakasita en 1937-38.

La edzino malfavoris

Ni ne scias, kian rolon ludis dum la disbato de SEU la opinio de Lenin, kia ĝi estis prezentita de liaj edzino kaj fratino, kvankam la deklaro de Drezen, citita de Keable, supozigas, ke ĝi almenaŭ en malfrua stadio malutile influis la juĝon de oficialaj instancoj.

Jam en 1923 la edzino de Lenin, N.K. Krupskaja, opiniis, ke "estas sencele elspezi tempon por enlerneja Esperanto-studado de infanoj", kaj en 1927 ŝi precizigis, ke "la provoj krei artefaritan

lingvon, similan al Esperanto, estas ekstreme naivaj kaj evidentiĝas la suprajn koncepton pri tio, kio estas kulturo".¹⁸ Dum komence ŝi kredis, ke "la artefarita lingvo restos posedaĵo nur de malgranda homgrupo", en 1930 Krupskaja cedis: "En plej bona okazo ĝi (Esperanto) taŭgas nur por interrilatoj." Sed plue estis por ŝi apenaŭ imageble, ke "homoj iam konvinkus en io unu la alian per Esperanto, ke junulo dirus siajn unuajn vortojn de l'amo al sia amatino per Esperanto, ke patrino kantus al sia ido lulkanton per Esperanto Internacian fratiĝon oni forĝas nur dum batalo, intimigas nur komuna batalo, sed ne artefarita lingvo."¹⁹

Ke Lenin pensis simile, kredigis lia fratino Maria Iljinniĉna en 1928: Lenin "plurfoje esprimiĝis pri Esperanto, nome tre malaprobe. Li trovis ĝin tro artefarita, tro simpligita, tro morta. Li nur esprimis la opinion, mallonge antaŭ lia malsaniĝo, ke necesus enkonduki ĝeneralan alfabeton, kio kompreneble estos farita post la revolucio. Estas konsilinde, ke la kamaradoj, argumentante favore al Esperanto, prefere ne apogu sin al Lenin, kies opinio pri tio estas al ili tute nekonata."²⁰

Se antaŭmilita inter esperantistoj oni diskutis pri la opinio de Lenin, oni ŝajne ne antaŭ-supozis, ke ĝi estis pozitiva: Ekz. dum la kongreso de la SAT-opozicio en Amsterdam (1931) la ruso Herbert Muravkin frontis la demandon, ĉu Lenin estis kontraŭulo de Esperanto; li sciis respondi nur, ke li dubas pri tio ...²¹

Resume, ni povas konkludi, ke Ĉaĉe ne kontribuis al klarigo de la mistero, sed pligrandigis ĝin. (Ke en liaj "memoroj" restas pliaj dubindaĵoj, kun kaj sen rilato al Esperanto, ni menciis nur flanke.) Kontraŭe, la plej multaj fontoj tute klare pravas, ke Lenin ĝenerale ignoris Esperanton kaj, ne studinte la problemon, tre verŝajne sentis antaŭjuĝojn kontraŭ la Internacia Lingvo.

Lenin kaj la lingva problemo

En la 'Verkoj de Lenin'²² ne troviĝas mencio pri Esperanto²³ aŭ propono kiel solvi la mondan lingvoproblemon, sed el liaj ideoj pri internacia kulturo oni povas dedukti, ke li ne antaŭvidis en sia teorio lokon por internacia lingvo. Por Lenin internacia kulturo ne estis sennacia, ev. kun supernacia lingvo kiel esprimilo, sed kombinaĵo de la proletaj kaj demokrataj elementoj de la unuopaj naciaj kulturoj; la batalo inter tiuj kaj la burĝaj

12. Kio havis nenian sekvon — krom fanfaronado de idistoj

13. "Heroldo de Esperanto", 38, 1962, n-ro 3, p. 2

14. 16/17-1-1919. Laŭ "Esperanto", 16, 1920, p. 32

15. "Hungara Vivo", 1963, n-ro 1; p. 12

16. E. Drezen: "Analiza historio de Esperanto-movado", Leipzig 1931, p. 86

17. "Bulgara Esperantisto", 38, 1969, n-ro 12, p. 3. — La publikigitaj tie (n-roj 10 kaj 12) "Novaj, nekonataj materialoj pri Maksim Gorkij kaj Esperanto" de Ilja Skapa montras la faman verkiston kiel konvinkitan adepton de Esperanto.

18. "Sennaciulo", 6, 1929/30, p. 296

19. "Komsomolskaja Pravda", n-ro 24, 30-1-1930; laŭ "Sennaciulo", 6, 1929/30, p. 253 N. K. Krupskaja: "Lenin pri lernado de fremdaj lingvoj", "Bulgara Esperantisto", 39, 1970, n-ro 3, p. 6-7.

20. "Raboĉe Krestjanskij Korrespondent", n-ro 21, 15-11-1928; laŭ la ekspertizo de Instituto pri Marksismo-Leninismo, Moskvo

21. "Kongreso de revoluciaj esperantistoj", Berlin 1931, p. 38

22. Dufoje oni reklamis por esperantlingva eldono de la Verkoj de Lenin: en 1932/33 en Germanujo, kie la planon fiaskigis faŝismo, kaj en 1936 en Soveta Unio ...

elementoj okazas per la lingvo de la respektiva nacio. Dum nacia kulturo pli frue esence restis burĝa kulturo, la proletaro devas ĉion subteni, kio detruas la barojn inter la popoloj kaj kio kondukas al la — libervola — kunfandiĝo de la nacioj, realiĝonta nur post tre longa tempo, eĉ ne tuj post la finvenko de komunismo. Lenin postulis, ke oni devas serĉi apogon ĉe la tuta proletaro, senkonsidere al lingvo kaj nacieco. Sed samtempe li emfazis, ke internacia edukado de la amasoj ne eblas sen la propagando por la rajto de subpremitaj nacioj je memdecido kaj je apartiĝo, kaj konsekvence necesas aparte akceli la lingvon kaj literaturon de laboristoj de antaŭe sklavigitaj popoloj.

Kvankam Lenin, almenaŭ ĝis 1917, neis, ke estas tasko de la proletaro evoluigi la naciajn kulturojn, li tamen ĉiam rigore montris al nepacigebla konflikto inter socialismo kaj nacia subpremo. Li sin turnis kontraŭ la deviga akceptigo de unu oficiala ŝtata lingvo, kies bezonon li kontestis, citante kiel modelon la kunekzistadon de tri/kvin lingvoj en Svislando, kaj li koncesiis al ĉiuj lingvaj grupoj la rajton pri lernejoj — tamen ne en la kadro de nacia-kultura aŭtonomio, sed sub la zorgoj de la centra registaro. Esprimante sin kontraŭ "geto"-lernejoj*, li ne detaligis kiel en realo venki la malfacilaĵojn de plurlingva lerneja sistemo.

Neniu lingvo havu ian privilegion, skribis Lenin, kaj el tio ni rajtas konkludi, ke ankaŭ neniu nacia lingvo povus fariĝi LA internacia.⁴² Kiam neniu lingvo plu estos altrudata, la bezonoj de la ekonomio decidis pri la avantaĝo de tiu aŭ alia lingvo, kiun la homoj konsentos apliki. Tion dirante, li unuavice celis la estontecon de Soveta Unio (kaj sekve tiun de la rusa lingvo), malpli la situacion en monda skalo, en kiu li kredeble kalkulis pri longedaŭra apudekzistado de pluraj ĉeflingvoj.

Baziĝante sur la marksisma konvinko, ke ne necesas timi pri la ŝancoj de la rusa, ĉar la disvolviĝanta ekonomio, t.e. la kultura bazo, postulas ĝian lernadon kaj uzadon, Lenin povis restadi en absolute senkompromisa pozicio kontraŭ ĉia formo de rusigo perforta, kio certigis al li kiel potenculo grandan prestiĝon, des pli ĉar en 1922 li per fajraj vortoj deklaris militon al la "grandrusa ŝovinismo".

Tiun ĉi gvidlinion de Lenin, ke la rusa ŝovinismo plej multe minacas la venkon de komunismo, renversis Stalin de post 1934, traktante la naciajn malplimultojn kiel ĉefan danĝeron: Dekreto, kiu deklaris la rusan lingvon deviga fako en ĉiuj minoritataj lernejoj, estis publikigita en marto 1938, kiam furiozis ankaŭ la persekutoj al Esperanto.

Se mankas konkreta indiko pri aparta simpatio de Lenin al Esperanto, historie pli gravas, ke sub lia regado la internacilingva movado multpromese ekfloris en Soveta Unio, ke la evoluo de la Esperanta kulturo, en la kadro de la laborista Esperanto-movado, ne estas imagebla sen la fekunda kontribuo de sovetaj esperantistoj kaj ke estas ne eble pravigi subpremon de tiu vivanta Esperanto, nek kiun ajn lingvan diskriminacion, per sinapogo sur teorioj de Lenin.

Jen kiel Lenin en 1920, postulante dungi interpretistojn en ĉiuj armeaj ĉefstaboj, telegrafis ĝuste al Stalin: "Se temas pri la lingvo, necesas ĉia koncesio kaj maksimumo da egaleco."

К ДОКЛАДУ т. ЕВСТИФЕЕВА на митинге рабочих Хамовнич. района в „НЕДЕЛЮ ПРОСВЕЩЕНИЯ“

на тему „Международный язык и Пролетариат“.

В 1847 в Лондоне, столице Англии, два немецких эмигранта, К. Маркс и Фр. Энгельс; провозгласили бессмертный лозунг:

„Пролетарии всех стран, соединяйтесь!“

Чтобы этот великий клич осуществился на деле и в полной мере,

нужны два условия:

1) нужно, чтобы пролетарии каждой страны освободились от своих поработителей-эксплуататоров!

2) нужно, чтобы пролетарии всех стран получили в свое распоряжение необходимейшее орудие всякого человеческого единения—язык!

И не какой попало язык, а именно такой язык, который специально создан, чтобы служить пролетариям всех стран, как их общий международный, объединяющий, вспомогательный для всех, второй (после родного) для каждого язык.

Освобождение мирового пролетариата, провозглашенное в брошюре в 1847 году, началось с России и именно с 25 октября 1917 года.

Это великое дело начали русские рабочие

большевики (коммунисты),

поставившие себе эту задачу конкретно с Лондонского съезда 1902 года.

Распространение пролетарского международного языка „Эсперанто“, опубликованного в брошюре, изданной в России 2 июня 1887 года, взяли на себя

эсперантисты,

которые сами дождались своего освобождения от цепей старого режима и от враждебного отношения власти лишь одновременно с другими пролетариями, т.е. с той же великой датой:

25 октября 1917 года.

Товарищи-пролетарии! Если вам действительно дорог

идеал всемирного единения всех трудящихся,

не давайте усыпить и отвлечь себя от срочного, безотлагательного дополнения этой великой даты новою великою датой:

днем признания пролетарского М. Я. „Эсперанто“

официальным международным языком Р. С. Ф. С. Р!

Чем скорей этот день наступит, тем лучше для вас и для трудящихся всего мира!

А когда этот день наступит? Это зависит лишь от вашей энергии и активной поддержки. Вынесите же, товарищи, особенно организованные рабочие, везде резолюции о необходимости безотлагательного осуществления принципа 1847 года, ибо

мало ВОСКЛИКНУТЬ, а нужно СДЕЛАТЬ так,

чтобы пролетарии всех стран действительно объединились, а для того нужно ввести везде, после родного языка, второй язык, а именно:

Пролетарский Международный Язык, „Эсперанто“!

Пусть русский пролетариат и в этом деле первый укажет дорогу пролетариям всех стран и народов!

Да здравствует **ОЧАГ ВСЕМИРНОЙ РЕВОЛЮЦИИ—Р. С. Ф. С. Р!**

Да здравствует **ОРУДИЕ ВСЕМИРНОЙ РЕВОЛЮЦИИ—пролетарский М. Я. „Эсперанто“.**

Основные черты Пролетарского М. Я. „Эсперанто“:

(В языке Эсперанто никаких исключений из правил не имеется!)

Всякое слово пишется так, как говорится, и говорится так, как пишется.

Азбука та же, что и у всех наших западных соседей: начиная с финнов, латышей, поляков, литовцев и т. д.

Все названия предметов оканчиваются на „o“. Наприм.:

Vivo—жизнь, Laboro—труд, Amo—любовь, Morto—смерть, Batalo—борьба, Froso—мороз и т. д.

Все названия свойств или качеств (предмета) оканчиваются на „a“. Наприм.:

Viva—живой, labora—трудоу, ama—любвиный, morta—смертный, batala—боевой, frosta—морозный и т. д.

Все названия действий или состояний (предмета) оканчиваются на „i“. Наприм.:

Vivi—жить, labori—работать, ami—любить, morti—умереть, batali—бороться, frosti—мерзнуть.

Все названия обстоятельств, при которых совершается действие или состояние ии проявляется свойство или качество предмета, оканчиваются на „e“. Наприм.:

Vive—живо, labore—трудоу образом, ame—любвино, morte—смертельно, бое—боеу путем, froste—леденящим образом.

Все слова, которые уже находятся в международном употреблении, вводятся в эсперантский язык без изменения, кроме указанных выше окончаний и упрощения их писания и произношения. Наприм.:

teatro—театр, teatra—театральный, teatro—по театральному, teatri—театральничать; profesoro—профессор, profesora—профессорский, profesore—по профессорски, profesori—профессорствовать; revoluci—революция, revolucia—революционный, revolucie—революционно, revolucii—совершать революцию; socialista—социалист, socialista—социалистический, socialiste—по социалистически, как социалист; Moskvo—Москва, Moskva—Московский, moskve по московски; Franco—француз, franca—французский, franco—по французски; telefono—телефон, telefona—телефонный, telefone—по телефону, telefoni—телефонировать.

Все числа образуются из 12 основных чисел: 1—unu, 2—du, 3—tri, 4—kvar, 5—kvie, 6—ses, 7—sep, 8—ok, 9—naŭ, 10—dek, 100—cent, 1000—mil.

1887—mil okcent okdek sep.

1919—mil naŭcent dek naŭ.

ДОМ „ЭСПЕРАНТО“

Proletarioj de ĉiuj landoj, unuigu!

Москва, Арбат С.авец-Вражек, 42.

(Пролетарийој де ĉиуј ландој, унуиĝу!)

Jam historia dokumento estas la ĉi-supra afiŝo, ŝajne el la jaro 1919, do nelonge post la oktobra revolucio. Ĝi difinas du kondiĉojn por efektivigo de la slogano "Proletoj de ĉiuj landoj, unuigu!":

La unuan kondiĉon — liberiĝon de la proletoj el la subpremo — ekplenumis la oktobra revolucio. La duan — havigon de unu komuna lingvo de la proletaro — ekplenumis la publikigo de Esperanto en 1887.

La afiŝon eldonis Domo "Esperanto" en Moskvo okaze de amaskunveno de laboristoj.

23. En "La 'maldekstra radikalismo', infanmalsano en komunismo" li nomis la demandon de germanaj maldekstruloj "Diktaturo de la partio" aŭ "Diktaturo de la amasoj": "ia nekompreneblaĵo, ia nova Volapük".

24. Кр. "Esperanto", 61, 1968, p. 140-141

* "geto" = juda kvartalo



Per ĉi tiu artikolo de prof. Lapenna komenciĝas nova serio, kiu prilumos unu post alia unuopajn erojn de la konata (kaj tamen ankoraŭ ne sufiĉe konata) Principaro de Frostavallen pri la informado pri la Internacia Lingvo. Post ĝenerala enkonduko, la aŭtoro turnas sin unue al la temo Kongresa Gazetara Servo, aktuala nun tuj antaŭ la Universala Kongreso en Vieno. Al tiu temo apartenas ankaŭ la kongresaj gazetaraj konferencoj. (Foto: konferenco en Helsinki.)

1. Enkonduka rimarko

Longa estas la historio de informado pri la Internacia Lingvo. Estis tempo, kiam ne ekzistis landaj aŭ aliaj organizaĵoj kaj kiam ĉio dependis de la iniciato de unuopuloj. La informado estis ofte nomata "propagando". Eĉ nomoj de Esperanto-organizaĵoj entenis tiun vorton. Troviĝadis multaj realismaj taksoj de la samtempa lingva situacio kaj objektivaj informoj pri la Internacia Lingvo, sed certe ne forestis fantaziaĵoj sen kia ajn bazo en la realo. Tiuj lastaj, kvankam certe bonintencaj, tamen ofte kaŭzis tian kompromitiĝon de la Esperanto-movado aŭ eĉ de la ideo mem de komuna lingvo, ke en multaj kazoj tutaj regionoj aŭ medioj restis fermitaj dum longaj periodoj por kia ajn pozitiva laboro.

Post la Dua Mondmilito, paralele kun la ĝeneralaj klopodoj restarigi la movadon el la ruinoj kaj adapti la organizan strukturon de UEA al la novaj cirkonstancoj, komenciĝis la klopodoj organizi la informadon kaj konformigi ĝian karakteron al la postuloj de la moderna mondo. UEA refondis sian "propagandan fakon" en Bournemouth (1949), sed jam dum la Universala Kongreso en Parizo (1959) transformis ĝin en Informan Fakon. La saman jaron ekfunkciis Internacia Gazetara Servo kun la celo liveradi taŭgajn kaj aktualajn informojn, unuflanke, al la presagentejoj kaj, aliflanke, al la landaj asocioj. En Parizo por la unua fojo funkciis ankaŭ la Kongresa Gazetara Servo (KGS), kiu ĉiutage liveris siajn bultenojn al la franca gazetaro en la franca lingvo, kaj al ĉiuj interesiĝantaj kongresanoj en la Internacia Lingvo. Sekvis reorganizado aŭ organizado de la landaj informaj fakoj. Ĉiujare, krom por 1954, estis publikigataj la rezultoj de informado en mondaj kadroj. Tio ebligis kaj al la centraj organoj de la Asocio kaj al la landaj organizaĵoj, resp. al iliaj informaj fakoj, fari analizojn kaj komparojn, observi la reagojn de la publika opinio, serĉi metodojn por plibonigoj.

Komence de 1956 la laboro jam tiel progresis, ke estis eble kunvoki la reprezentantojn de la landaj informaj fakoj al aparta kunveno, kies celo estis trastudi ĉiujn demandojn, ligitajn al la informado. La kunveno efektive okazis fine de julio en Frostavallen, Svedujo. Dum 6 tagoj, preskaŭ ĉiun posttagmezon, kompetentaj laborantoj sur la kampo de informado diskutadis la problemon. La rezulto

estis formulita en la dokumento "Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo", kiu estis unuanime akceptita en la kunveno de la 30-a de julio 1956.

La Principaro de Frostavallen estas valida ankaŭ hodiaŭ. Ĝi konsistas el 9 mallongaj ĉapitroj kun 21 punktoj (vd. la broŝuron "Statuto kaj Regularoj de UEA", 1968, pj. 58-62). Ĝi devus esti plej atente trastudita de ĉiu landa informa fako kaj entute de ĉiu persono, kiu deziras efike kaj celtrafe helpi al disvastigo de la Internacia Lingvo per kiu ajn rimedo de informado.

Dum sia lasta printempa kunsido la Estraro de UEA okupiĝis ankaŭ pri la demando kiamaniere plibonigi la informadon. Interalie ĝi decidis komisi la verkinton, kiu en siaj antaŭaj funkcioj de estraro pri informado kaj ĝenerala sekretario respondis ankaŭ pri la Informa Fako de UEA, pritrakti en serio da artikoloj la plej gravajn punktojn de la Principaro de Frostavallen. La unua aperas en tiu ĉi numero. Aliaj sekvos.

2. Kongresa Gazetara Servo

En la nuna momento, nur kelkajn tagojn antaŭ la U.K. en Vieno, la plej grava sendube estas la ero rilatanta al KGS. Kiel en la antaŭaj jaroj, ankaŭ en Vieno funkcias la KGS. Ĝi eldonos ĉiutage bultenon kun novaĵoj en Esperanto kaj en la nacia lingvo. Same kiel en Helsinki, ĝi prizorgos artikolan servon por la aŭstra gazetaro, fotoservon, intervjuojn, radio-servon kaj, se iel eble, novaĵojn en la televido. Krome, radio Varsovio disaŭdigas regulajn ĉiutagajn informojn pri la disvolviĝo de la kongresaj laboroj.

Rilate la kongresan landon neniam estis gravaj malfacilaĵoj. La landa gazetaro, radio, televido abunde informadis pri la kongreso. Espereble la samo okazos en Vieno. Pri tio zorgas rekte la KGS mem.

En la pasinteco la ĉefa manko estis la tre nekontentiga utiligado de la KGS por informadi pri la UK en aliaj landoj. Por eviti la saman eraron en Vieno, necesas ke la landaj informaj fakoj aŭ la landaj asocioj sen informaj fakoj komisiu kompetentan personon sendadi tre koncizajn informojn al sialandaj ĉefaj gazetoj jam el la kongresa urbo mem. La komisiitoj povas ricevi senpage la ĉiu-

tagan bultenon de la KGS kaj ĉerpi el ĝi taŭgajn informojn, nepre aldonante kelkajn vortojn pri la reprezentiĝo de la propra lando. Tio ĉiam helpas al publikigo. Se neniel estas eble havi apartan komisiiton, oni povas bonege utiligi la informojn en Esperanto de Radio Varsovio. La pasintan jaron s-ro L. Pickel (Germanujo) ne ĉeestis la kongreson

en Helsinko. Tamen, surbaze de la elsendoj de la Pola Radio pri la UK, li povis ĉiutage sendi komunikojn al la germana gazetaro, kiu volonte publikigis tiajn freŝdatajn informojn.

Ofte oni aŭdas plendojn, ke la gazetaro ne interesiĝas. Tio certe ne estas tute ĝusta. Se oni liveras al ĝi aktualajn kaj freŝdatajn novaĵojn, ĝi volonte publikigas. Sed devas troviĝi iu, kiu liveros ĝuste tiajn informojn.

Universala Kongreso de Esperanto estas ĉiam evento. Ankaŭ la viena estos tia. Per iom da bona volo kaj certe ne tro granda laboro oni povas facile atingi, ke multaj informoj pri ĝi aperu en amaso da gazetoj ĉie tra la mondo.

Raporto pri informado en 1969 *

G. Becker

En mia lastjara artikolo "Kion skribis la gazetaro en 1968?" (Esperanto, n-ro 764-5, p. 119) mi petis, ke oni estontece sendu pli da gazet-artikoloj pri Esperanto aŭ pri la lingva problemo (el ĉiuj mon-dopartoj, en ĉiuj lingvoj) ĝenerale al la Centra Oficejo, kiu siavice post diversmaniera utiligo transdonas ilin al mi por kompletigi la kutiman statistikon kaj fari detalan analizon. Kvankam venis iom pli da artikoloj, mi ripetas la peton kaj aldone ŝatus, ke pri aparte gravaj televid- aŭ radio-elsendoj, prelegoj kaj ekspozicioj kaj pri aliaj kampanjoj oni informu ankaŭ samvoje.

Mi faris du statistikojn: unu laŭ la demandoj kaj unu laŭ la ricevitaĵoj artikoloj. Kiel vi scias, ĉiuj tiuj ciferoj povas en niaj kondiĉoj nur esti nekom-pletaj. Tamen mi povas jam nun diri, ke aperis en la pasinta jaro pli da artikoloj, sed duonon el ĉiuj liveras kune Francujo kaj Germanujo, unue ĉar nia informa centro estas en Parizo, kio nepre efikas unuavice al Francujo (jam delonge mi proponis krei similajn informojn en aliaj gravaj centroj), due ĉar en Germanujo laboras ankaŭ bona informa fako kaj aldoniĝas la el informa vidpunkto same unuaranga kampanjo "Esperanto programita".

Absolute necesas tamen atentigi pri kelkaj gravaj problemoj: plibonigado de nia informado sur ĉiuj niveloj, adapto de modernaj metodoj de informado, bona preparado de la prikongresa informado en la diversaj landoj, ekligo de kontaktoj kun reprezentantoj de gazetar-agentoj. Laŭ propono de la komitata komisiono pri la laborplano ni rekomendas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj reagi al diversaj artikoloj aperantaj en la nacilingva gazetaro; aparte reagi al la kreskanta minaco de certaj naciaj lingvoj, kiuj pretendas ludi la rolon de internacia komunikilo; dediĉi pli grandan atenton al Esperanto-radioelsendoj, aperigadi fragmen-tojn de la elsendoj, fari recenzojn pri la programo; klopodi pri produktado de kvalitaj diskoj kun Esperanto-kanzonoj, penetri per esperantlingvaj kanzonoj en festivalojn.

Interesa demando estas nun, ĉu en la jaro 1969 en la informado pere de gazetoj respeguliĝas almenaŭ parte la menciitaj punktoj? Bedaŭrinde mi povas doni nur malmultajn ekzemplojn:

Nia juna membro P. Daŝgupto en Hindujo respon-dis per tre inteligenta letero al mismencio pri Esperanto en "Hindustan Standard".

Pri la eldono de la "Korano" en Esperanto menciis multaj gazetoj, i.a. "Secretariat News" de UN kaj en "The Truth", gazeto en Nigerio.

La kongresa parolado de la prezidanto de UEA aperis ne nur en finnaj kaj aliaj naciaj gazetoj, sed ankaŭ ekzemple en "L'Europe en formation". Daŭris la publikigo de la artikolo de prof. Lapenna pri kultura genocido kaj homaj rajtoj, ekzemple en la oficiala organo de la Aŭstra Ligo por Homaj Rajtoj "Das Menschenrecht".

Grandan intereson ĉiam vekas artikoloj pri Esperanto en instruado. Ne nur "Esperanto pro-gramita" impresis la publikon, sed ankaŭ instruado en lernejoj kaj universitatoj (ekz-e en Clermont-Ferrand, Francujo, kaj en la Universitato de Amsterdam, Nederlando).

Esperanto-parolanta senatano E. Dahl ĉe ŝipo-bapto en Uddevalla, Svedujo, impresis ne nur en svedaj gazetoj, sed ankaŭ en eksterlandaj. Aper-o de s-ro W. Auld en la Skota Televido donas kaŭ-zon por frontpaĝa artikolo en "Alloa Advertiser".

Aperado de "Turista Mondo" de d-ro Unger el Svislando havis grandan eĥon en multaj fakaj kaj aliaj gazetoj. Ankaŭ aliaj fakoj okupiĝis pri la lingva problemo. Ekzemple, "Toute l'Électronique" aperigis artikolon de s-ro Aisberg "Abolir les barrières linguistiques" (forigi la lingvajn barojn); fervoja gazeto "La Vie du rail" menciis pri la fervojista kongreso en Francujo.

Plej ĉarmajn menciojn pri Esperanto mi mal-kovris en "Pacific Island World", gazeto por Melanezio, Mikronezio kaj Polinezio, kaj en franca gazeto "Le Figaro", ke sur la geedziĝa merkato en la Kongreso japanoj estas plej dezirataj.

Resumaj ciferoj pri informado: Ĉi tie estas donitaj nur la resumaj ciferoj de la jaro 1969 kaj paren-teze troviĝas, por ebligi komparon, la ciferoj de la jaro 1968. Laŭ la informoj el 38 (43) landoj, aperis 4 814 (3 646) artikoloj kaj 9 543 (10 910) informoj en nacilingvaj gazetoj. Ĉe 810 (902) pre-legoj pri Esperanto ĉeestis 44 550 (56 190) perso-noj. Okazis 851 (954) nacilingvaj radio- kaj televid-programoj. 261 (165) ekspoziciojn vizitis 151 138 (326 037) personoj. Estis disdonitaj 350 151 (299 327) informiloj.

* El la raporto estas ellasitaj kelke da eroj, aliloke men-ciitaj en ĉi tiu numero. (Red.)

sano en menso

Kreskas nova generacio de pensuloj.

Morgaŭajn malkovrojn faros la junuloj de hodiaŭ.

Daŭre kreskas ankaŭ la scienco de l'homaro, kaj ĉiu infano devas lerni pli ol liaj gepatroj.

Instruiloj de Philips igas lernadon pli facila, pli plezura.

Moderna klasĉambro ne estas kompleta sen magnetofono, instru-maŝinoj, televido aŭ radio.


Sed, kiel ĉio kio kreskas, ankaŭ infano bezonas protekton, protekton kontraŭ malsaniĝo.

Radiografiaj kaj medicinaj aparatoj de Philips helpas gardi la sanon de la nova generacio.

Philips fieras pri sia kontribuo al la mondo de morgaŭ.


Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips

kaj korpo



PHILIPS

La problemo pri esperantigo de nomoj estas unu el la plej malnovaj kaj plej abunde diskutitaj en la Esperanta literaturo. La aŭtoro de ĉi tiu studo, Albert Lienhardt, citas plurajn el la plej gravaj verkoj pri tiu temo, sed ĝisfunda bibliografio verŝajne postulus plurajn paĝojn de nia revuo! Tamen ĝenerala opinio regas, ke necesus iam atingi unuecan principaron, kaj tial ni publikigas ĉi-monate la argumentojn de unu tendaro, kiu maksimume rezistas al esperantigo de nomoj. Ĉu ne eblas, ke ĉi tiun problemon solvu la Internacia Lingvo laŭ la sama maniero, kiel tion faras la naciaj lingvoj? Plejparte ili alproprigas kaj aliformigas nur etan nombron da nomoj ofte renkontataj. Sed kie meti limon? Kaj kiel difini, kiuj nomoj estas plej gravaj?

Unu el la lingvaj demandoj, kiuj ofte elvokas diskutojn, estas tiu pri esperantigo de nomoj.

Tiu demando rilatas ĉefe al

- persono-nomoj, t.e. patro-nomoj kaj antaŭ-nomoj*,
- urbo-nomoj, kaj
- lando-nomoj (al kiuj oni povas alkalkuli la nomojn de kontinentoj, maroj, montoj, riveroj, lagoj, insuloj, k.s.).

La iom vasta temo pri lando-nomoj pritraktita jam ofte kaj diversloke, ne povas trovi lokon en mallonga artikolo. Povos utili, ĉi tie, citi kelkajn referencojn, i.a. la 92-paĝan raporton de Gaston Moch, prezentitan en 1910, sub la titolo "Pri la transskribo de propraj nomoj", al la tiama Lingva Komitato (Raporto n-ro 7, kun 29 bibliografiaj eroj, eldonita fare de Esperantista Centra Oficejo, Paris, 1910), la paragrafon 69/3 en "Plena Gramatiko" (1938), la ĉapitron "La landnoma demando" en la libro "Lingvo kaj vivo" de G. Waringhien (eld. Stafeto, 1959), la ĉapitron "Geografio" en la vortaro "Dictionnaire Français-Esperanto" de Léger kaj Albault (eld. E.F.E., Marmande, 1961), kaj la "Mondmapon" (eld. I.O.E., Beograd, 1969).

En ĉi tiu artikolo, ni devos limigi nin je la demando pri esperantigo de persono-nomoj kaj de urbo-nomoj.

A. Persono-nomoj

1) **Patro-nomoj.** Estas konata fakto, ke ĉiu homo posedas propran nomon, kiu estas laŭleĝe registrita en la naskiĝ-loka "oficejo pri civila stato" (A: registry office, F: office d'état civil, G: Standesamt).


La plej multaj ŝtatanoj ne rajtas kaprice ŝanĝi sian propran nomon, nek tute, nek parte, escepte en kazoj, kiam la registara aŭtoritato donas, post oficiala enketo, la permeson fari ĝin. Konforme al tiu principo, estas kontraŭ-leĝe, do kondamnende, esperantigi proprajn nomojn

a) tradukante ilin, se, lingve, tio estas farebla (ekzemple: uzi la nomon MUELISTO anstataŭ A: Miller, F: Meunier, G: Müller, k.t.p.),

b) transskribante ilin pli malpli fonetike (ekzemple: BODLER anst. Baudelaire, BOKAĈO anst. Boccacio, MAK BET anst. Macbeth, RASEL anst. Russel, kaj similaj, troveblaj en certaj litera-

turaĵoj kaj gazet-artikoloj).

Tiu-rilate, estas oportune citi ĉi tie, el la jam menciita Raporto n-ro 7 de Gaston Moch, la "gvidantan principon", aprobitan fare de la Komitato pri Propraj Nomoj: "Oni devas lasi kiel eble plej zorge al ĉiu propra nomo ĝian fizionomion, skribante ĝin laŭ nacia ortografio, kiam eble, aŭ trans-



skribante ĝin fonetike, kiam ĝi devenas de lingvo, kiu uzas apartan (t.e. ne-latinan) alfabeton. Oni devas esperantigi ĝin nur, kiam oni ne povas agi alimaniere: tia esperantigo estas malbonaĵo kiu, okaze, povas montriĝi necesa, sed kiun oni evitu laŭeble." Pri tio, estas utile memorigi la trafan parolon de J. W. von Goethe: "La nomo de homo estas lia vesto, kaj neniu havas la rajton ĝin difekti!"

2) **Antaŭ-nomoj.** Pri ili, la situacio estas principe la sama. Pretendi traduki, ekzemple, la samajn kaj tamen nacilingvajn antaŭ-nomojn François, Francis, Frank, Franz, Ferenc, Francesco, František, kaj tiel plu per FRANCISKO estas misfaro nepre evitenda.

Tamen, en literaturaj verkaĵoj originale verkitaj en Esperanto, oni povas toleri certajn esperantigojn de antaŭ-nomoj. Sed por konvinkiĝi, ke ofte la rezultato de tiaj nomo-tradukoj vere ne estas tre kontentiga, sufiĉas tralegi la rilatan ĉapitron en la (cetere bonega) vortaro "Dictionnaire Fran-

* La aŭtoro uzas la terminojn "persono-nomo" en la senco de homo-nomo, "patro-nomo" en la senco de familio-nomo kaj "antaŭ-nomo" en la senco de individuo-nomo. (Red.)

çais-Esperanto". Jen kelkaj specimenoj: Aglaa, Antoneno, Bernardeno, Blazo, Brico, Ĉarloto, Dezi-derato, Eŭstako, Felicita, Florenteno, Gaciano, Ĝilo, k.t.p., kiuj ŝoketas ne nur francojn, sed ankaŭ aliajn eŭropanojn.

B. Urbo-nomoj

Estas facile konstateble, ke, en nacilingva uzo, oni renkontas relative malmultajn tradukojn de fremdaj urbo-nomoj, ekzemple F: Londres anst. A: London; F kaj A: Munich anst. G: München; kaj simile.

Tio pruvas videble, ke la natura lingvo-sento de la popoloj malinklinas je arbitraj nomo-tradukoj de urboj, precipe konsiderante la grandegan nombron de urbo-nomoj en la tuta mondo. (Ekzistas, tamen, relative multaj urboj, kies nomo estis ŝanĝita pro politikaj cirkonstancoj, ekzemple Strassburg/Strasbourg, Mumpelgard/Montbéliard, Danzig/Gdansk, Brünn/Brno. Sed tio estas naciigo de urbo-nomoj, ne traduko.)



Konsiderante tiun fakton, oni ne povas ne miri pri la tendenco disvastiĝanta traduki pli kaj pli da urbo-nomoj en Esperanton, kio ofte rezultigas vortarojn ne nur kuriozajn, sed eĉ ŝokantajn kaj ne-tolereblajn. Por ilustru nian aferon, jen kelkaj esperantigitaj urbonomoj, ĉerpitaj el la vortaro ĵus menciita: Albiĝo, Anĝevo, Antakio, Belvezo, Bizontio, Blezo, Bordofo (aŭ Bordeo), Kalezo, Ĉestro, Kortrejko, Dunkirko, Fontanbelo, Agri-gento, Lepziko, Manso, Memfido, Messo, Milavo, Montaŭbano, Mulhaŭzo, Onego, Oranĝo, Paŭo, Perigozo, Peruĝo, Plaĉenzo, Podo, kaj tiel plu.

Necesas, tiu-rilate, fari la jenajn demandojn:

a) Kiom da Esperanto-uzantoj de diversaj landoj (sen paroli pri la kompatindaj komencantoj) estas kapablaj tuj kaj sen-pene rekoni la originalajn nomojn de ĉiuj tiuj urboj, nome: Albi, Angers, Antioche, Beauvais, Besançon, Blois, Bordeaux, Calais, Chester, Courtrai, Dunkerque, Fontainebleau, Girgenti, Leipzig, Le Mans, Memphis, Metz, Millau, Montauban, Mulhouse, Onéga, Orange, Pau, Péri-

geux, Pérouse, Plaisance, Le Puy, kaj tiel plu?

b) Kie troviĝas, laŭ-nombre, la supra limo de esperantigo de urbo-nomoj? (En la menciita vortaro, oni trovas jam tricenton da tiaj nomo-tradukoj; nenio malhelpas "daŭrigi la ludon" kaj esperantigi sammaniere ankoraŭ pliajn centojn, eĉ milojn, da aliaj urbo-nomoj... Kiu, finfine, povus memori ilin?)

c) Kian praktikan utilecon havas esperantigitaj urbo-nomoj? (Ili ne povas servi en la poŝt-trafiko; krome, ili ne estas uzataj en turismaj prospektoj, sur plur-lingvaj ilustritaj poŝtkartoj, kaj simile.)

d) Kial veki, ĉe la ekstera publiko, ne rezisteblan mokemon kaj ridemon pri tiuj strange aspektantaj nomo-tradukoj kaj ties adjektivaj formoj? (En iu raporto, oni povis legi: "Kelkaj Mansaj kaj Podaj samideanoj renkontiĝis", anst. "Kelkaj samideanoj el Le Mans kaj Le Puy renkontiĝis". Ĉu komenti??)

Ĉi tiuj demandoj (kaj la implicitaj respondoj) elvokas nepre la jenan rekomendon: Ni evitu esperantigitajn urbo-nomojn, ĉar ili ne nur balastas sen-utile nian lingvon, sed krome riskas damaĝi ĝian reputacion! Prefere ni uzu, same kiel estas la kutimo en naciaj lingvoj, la fremdlingvajn urbo-nomojn en ilia originala skribo-formo, aŭ en taŭga latin-litera transskribo!

C. Kiel prononci nomojn?

Restas la demando pri la prononco, kiam, legante Esperanto-tekston, oni renkontas ne-konatan nacilingvan persono-nomon aŭ urbo-nomon. La plej simpla solvo — jam ofte uzata — estas: aldoni post la nomo, inter krampoj, proksimuman prononco pere de laŭeble fonetika transskribo, kun la indiko "prononcu:", aŭ "pron.:", aŭ simple du-punktoj (:). Por tio, oni uzu nur la Esperanto-alfabeton, sen trudi al la legantoj la studon de fremdaj sonoj kaj literoj; tiamaniere, oni atingas precizecon iom malpli grandan, sed tamen tute sufiĉan, ol uzante kompletan fonetikan sistemon relative komplikan.

Jen, ekzemple, kelkaj nomoj de anglaj, francaj kaj germanaj urboj, kun la respektiva prononco-klarigo:

a) Aberdeen (: ebrdin), Ambleside (: emblsajd), Blackpool (: blekpul), Brighton (: brajtn), Cambridge (: kejmbrîĝ), Exmouth (: eksmaŭ), Glasgow (: glasgoŭ), Newcastle (: nju-kasl), k.t.p.

b) Angers (: anĝe'), Aubenas (: ob'na), Auxerre (: oser'), Bordeaux (: bordo'), Châteauroux (: ŝatoru'), Châtellerauld (: ŝatelro'), Courbevoie (: kurbevŭa'), Dunkerque (: dankerk'), Fontainebleau (: fontenblo'), k.t.p.

c) Blieskastel (: blis-kastl), Braunschweig (: braŭn-ŝvajg), Crailsheim (: krajls-hajm), Düsseldorf (: disl-dorf), Göttingen (: getingn), k.t.p.

Por fini, jen kelkaj ekzemploj de nacilingvaj patro-nomoj, kun proksimuma "prononco figurita": Beaudelaire (: bodler'), Chenier (: ŝenje), Molière (: moljer'), Verlaine (: verlen'), Musset (: mise), Schiller (: ŝil'r), Goethe (: gete), Russel (: rasl), Shelley (: ŝele), Boccaccio (: bokaĉjo), Carducci (: kardučĉi), Petöfi (: petofi), Franz Liszt (: frans list), k.t.p.

Albert Lienhardt (: linhart)
F-68-Mulhouse (: milhuz')



Zora Heide,
aŭtorino de
"Ni homoj..."

Kvazaŭ fotografe kaptita aspekto de la vivo

**Recenzas Dermot Quirke
(London):**

Ni, homoj ..., de Zora Heide. Aabyhøj:
Dansk Esperanto Forlag, 1970. 70 p.
21 cm. broŝ. ISBN 887 8502 041 9

Mia avo estis kamparano en suda Irlando, malriĉa analfabeto, ankoraŭ parolanta nur la gaelan lingvon. Por li la cetera mondo apenaŭ ekzistis, ĉar dum la tuta vivo li neniam vojaĝis pli ol dudek kilometrojn for de sia vilaĝeto. Lia mondo konsistis el kelkdek najbaraj familioj. Se li ankoraŭ vivus, estus fremda al li mia ekzisto inter ok milionoj da londonanoj. Bruo, aŭtoj, televido, jet-tondro, hasto — por li, fremda mondo.

Ili ankoraŭ kunekestas en nia mondo, la malnova, mallarĝa vilaĝana vivo, kaj la moderna, riĉa, hasta urbana vivo. Foje ili tuŝas unu la alian. Eleganta urbanino renkontas surtrajne maljunan kamparinon, al kiu la ekstera mondo estas timige mistera. Maljuna vilaĝa ŝuisto faras longe projektatan vojaĝon al la granda fora urbo por revidian profesie sukcesan fraton. Jam urbaniĝinta studento revizitas la gepatran vilaĝeton kaj enamiĝas kun vilaĝema junulino.

Ĝuste tiaj renkontiĝoj inter du malsamaj mondoj estas la ŝtofo, sur kiun brodas Zora Heide siajn rakontojn. Ŝi ĉerpas el sia vivosperto en la hejmlando, Jugoslavio, materialon por simplaj, perfekte skizitaj, delikataj vinjetoj. Sukerecan nostalgion ŝi

ne proponas; tutsimple ŝi malfermas por la leganto fenestron, tra kiu li vidos alian mondon, kiu estas samtempe tute fremda kaj tamen profunde parto de lia pramemoro. Kvazaŭ fotografe ŝi kaptas por ni rapide malaperantan aspekton de nia komuna vivo. Mi bonvenigas ĉi tiun memor-kaptan verkon. **Mendu ĉe UEA:** 4,30 gld. + sendokostoj 10 %.

Laste aperis . . .

du tradukoj de konataj lernolibroj de Esperanto: Erik Carlén tradukis en la svedan la anglan lernolibron de William Auld, "Esperanto, A New Approach", kaj Jorge Hess adaptis al la hispana la rektametodan kurson de Szilágyi. La tradukoj nomiĝas respektive "Spraaket över gränserna" kaj "Curso práctico de Esperanto" (2a eld. 1970). Interesan teorion prezentas Vilho Setälä, aŭtoro de "Privilegia vojo", en nova disko de Amo-Akademio sub la titolo "Kiel lerni novan lingvon?" (La voĉalbumo, n-ro 9). Akompanas ĝin presita teksto.

La poeto Edwin de Kock ĵus eldonis du novajn proprajn verkojn: "Poemaro kaj prozeroj" (103 p.) kaj alian poemaron "Kvin elementoj" (55 p.). Ambaŭ verkoj estis ofsete presitaj en Sud-Afriko. Eldonejo L'omnibuso en Kioto sendis ankoraŭ unu verkon de Ueyama masao, "Pardonon!". Temas plejparte pri mallongaj rakontoj (71 p.). Restas mencii: "Dokumentoj kaj materialoj" de la Konferenco de la Komunistaj kaj Laboristaj Partioj, Moskvo, 5-17 junio 1969. Eldonis la Esperanto-komisiono en Moskvo.

NEKROLOGOJ

MONTAGU CHRISTIE BUTLER (1884-1970)

La 5an de majo 1970 forpasis en sia 86-a jaro s-ro M. C. Butler, akademiano kaj bibliotekisto de Brita Esperantista Asocio.

Lerninte la lingvon jam en 1905, M. C. Butler instruadis ĝin kaj prelegis pri ĝi — precipe en lernejoj — dum pluraj jardekoj. Lia detala lernolibro "Step by Step in Esperanto" atingis sian 8-an eldonon en 1965. Unika kontribuo al la movado estas ankaŭ lia "Klasifo de Esperantaj temoj" (1950), kiu adaptas la decimalan klasifistemon al la bezonoj de Esperantaj bibliotekoj. Ne nur la klasifo, sed la biblioteko mem de BEA estas kreaĵo de li. Tamen li mem opiniis sia plej grava kontribuo al la movado la adapton de la stenografio Pitman al Esperanto. Lian "Esperanto-English Dictionary" (1967) la recenzo nomis "la plej bona angla E-vortaro ĝis nun aperinta", "iel lia ĉefverko". El liaj multaj aliaj verkoj ni menci ankoraŭ: la tradukon de "Fundamentoj de Kva-kerismo" kaj la ŝatatajn kolektojn "Esperanta



M. C. Butler

FORPASIS DU AKADEM

kantaro" kaj "Esperanta himnaro", jam en sia kvina eldono. Li plenumis serion da funkcioj en la brita kaj internacia movadoj: membro de la Lingva Komitato kaj poste Akademio de 1922 ĝis la morto; iama redaktoro de "British Esperantist", ĉefkunlaboranto de Enciklopedio de Esperanto (1a eld.); honora prezidanto de BEA de post 1961.

RUDOLF RAKUŜA (1893-1970)

Forpasis la 25-an de majo en Ljubljana prof. Rudolf Rakuŝa, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de multaj pedagogiaj verkoj. Li estis profesoro en diversaj mezlernejoj kaj laste en la Pedagogia Akademio en Maribor, Jugoslavio. Lerninte Esperanton en 1922, prof. Rakuŝa aktiviĝis en la landa movado kaj gvidis JEL de 1927 ĝis 1929. Li verkis plurajn lernolibrojn por slovenoj, "Metodikon de la Esperanto-instruado" kaj multajn broŝurojn pri Esperanto. Li ludis gravan rolon en la organizo de la lastjaraj lernejoj konferencoj en Maribor. Ekster la movado li estis konata pro la



LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Belgujo

- Kvindek-jaran jubileon atingis la internacia gazeto "Heroldo de Esperanto", kies unua numero eliris (sub la tiama titolo "Esperanto triumfonta") en aprilo 1920.

Brazilo

- En la dimanĉa eldono de la gazeto "Diário Popular" (S. Paulo, 100 000 ekz.) aperas de post 8 marto 1970 nekutima Esperanto-kurso. Ĉiuj lecionoj estas bazitaj sur tekstoj de Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple en la unua leciono la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Verkas la kurson FD de UEA s-ro Walter Francini.

Bulgarujo

- En la 4a n-ro de 1970 de la revuo "Nuntempa Bulgario" ĝia redakto anoncas, ke pro teknikaj kaŭzoj la revuo ne plu aperos. La ĉi-jarajn abonojn

Maldekstre: la nova hotelo Esperanto apud la vilaĝo Pribylina en Ĉeĥoslovakujo.

la eldonejo intencas kompensi per "alia, egalvalora eldono".

Hindujo

- En marto okazis en Ahmedabad (ŝtato Maharashtra) la 5a tuthinduja kongreso por forigo de la angla lingvo "Angrezi Hatao" (la anglan forigu). Cent kvindek delegitoj ĵuris labori senlace, ĝis la angla lingvo malaperos el la lando.

Israelo

- Israela Radio en Jerusalemo per la ĉefa ondo "A" disaŭdigis en la 23a de aprilo prelegon de mag. Isaj Dratwer pri Zamenhof.

Rumanujo

- En banloko Covasna okazos fine de aŭgusto (29-30) "neoficiala rumana kongreso de Esperanto", t.e. tutlanda renkontiĝo — kun junulara kunveno, ekspozicio kaj ekskurso — al kiu estas bonvenaj ankaŭ eksterlandanoj. Informas: S-ro Zágoni Jenő, Urba Kulturdomo, Covasna.

Soveta Unio

- En februaro 1970 okazis en la Domo de Amikeco en Moskvo plilarĝigita kunsido de la Centra Esperanto-komisiono ĉe SSOD (Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj), kiun partoprenis krom moskvaj aktivuloj ankaŭ reprezentantoj de la 8 respublikaj Esperanto-komisionoj, i.a. estona, latva, litova, uzbeka, armena kaj kartvela.

FAKE

Kampado

- En Britujo stariĝis aparta Esperanto-asocio por tendumistoj kaj uzantoj de loĝveturiloj. Kvardek ses el la partoprenantoj de la ĉi-jara Brita Kongreso en Harrogate kunloĝis en kampadejo. La organizaĵo planas aranĝi ĉiujare tian kampadon, ankaŭ okaze de la Universala Kongreso en Londono, 1971.

Kristanoj

- Laŭ informoj de KELI, kaj IKUE, la Komuna Kongreso de Kristanoj kaj Katolikoj (24-31 julio 1970) ne povas okazi en Brno pro decide de la ministerio de internaj aferoj. La organizantoj urĝe serĉas alian kongresurbon kaj informos rekte la partoprenantojn.

Turismo

- Prospektoj en Esperanto aperis lastatempe pri Vättern kaj Jönköping (Svedujo) kaj pri Grosseto (Italujo). Oni petu ilin ĉe la urbaj turismaj oficejoj. Swissair eldonis faldfolion pri karavanvojaĝo de Hispanujo al la UK en Vieno, kaj okaze de la IFEF-kongreso aperis "En Italio por viaj rendevuoj kun la suno", eld. Italaj Ŝtataj Fervojoj. Ankaŭ Foiro de Barcelono ĉi-jare eldonis, krom la kutimaj afiŝoj, faldfolion.

PERSONE

Elvin

- La 7an de aŭgusto festas sian 65-jaran datrevenon s-ro H. L. Elvin, direktoro de la Instituto pri Edukado de la Universitato de Londono kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

IANOJ

verkado de unueca stenografia sistemo por la kroata kaj serba lingvoj.



ANTON BALAGUE

Mortis Anton Balague, centra administranto kaj unu el la ĉefaj aktivuloj de Mondpaca Esperantista Movado. Hispandevena, s-ro Balague loĝis en Aŭstrujo. Li estis membro de UEA ekde 1947, vicdelegito kaj fak-delegito ekde 1950. La forpaso okazis la 19an de majo 1970.

H. L. HARTOG

La 23-an de marto 1970 mortis, 59-jara, s-ro H. L. Hartog, fak-delegito por turismo en Volendam, Nederlando. Li estis konata aktivulo kaj malnova membro de UEA.

EDGAR A. WALKER


Mortis en Aŭstralio, 83-jara, la tre malnova membro kaj iama delegito Edgar A. Walker, la 5-an de februaro 1970.

Kunveno de la Fakaj Asocioj, ĈD, D kaj FD dum la UK en Vieno

INVITO AL DELEGITOJ

Dum la U.K. en Vieno okazos aparta kunveno de reprezentantoj de fakaj asocioj, ĉefdelegitoj, delegitoj kaj fakdelegitoj. La enkondukajn raportojn prezentos prof. d-ro I. Lapenna kaj d-ro Sadler. Resumoj aperas en la Kongresa Libro. Unu el la celoj de la kunveno estas pritrakti la ĝeneralajn aspektojn de agado en fakaj medioj, kaj la rolon de la FA kaj FD; la alia celo estas preparoli la metodojn por ampleksigo kaj pliefikigo de la delegita reto.

Ĉiuj ĈD, D kaj FD, kiuj ĉeestos la kongreson en Vieno, estas afable petataj partopreni la kunvenon. La fakaj asocioj ricevis apartan inviton kun pliaj detaloj.



KALEN- DARO

jul. 1970 - feb. 1971

Itala kongreso estos internacia

Al la krosad-kongreso, organizata de Itala Esperanto-Federacio, jam aliĝis, ĝis la fino de majo, pli ol 150 personoj el dek landoj. Antaŭvideble la manifestacio, kiu okazos de la 19a ĝis la 26a de septembro, fariĝos vere internacia.

La kongreson oni inaŭguros en Genova post gazetara konferenco ĉe la fama "Teraso Martini" en la centro de la urbo.

"Caribia" dum pluraj jaroj estis unu el la ĉefaj italaj ŝipoj survoje al Norda Ameriko; nuntempe, ĝi estas la plej granda turisma ŝipo en Mediteraneo kun vasta internacia klientaro. La internaj salonoj estas lukse aranĝitaj kaj taŭgaj por komfortaj kongresaj laboroj.



Salono
de ŝipo
"Caribia",
unuaklasa.
La ŝipo de
24 500
toneloj
enhavas
ankaŭ ĉiujn
instaladojn
por amuzo.
Tiu unika
kongreso
sur ŝipo
estas jam
atentata
de multe da
Esperanto-
organizaĵoj

Julio

- 5-11 Int. E-Kampado, Väaksy, Finnlando
- 5-11 8a Somera E-Universitato, Gyula, Hung.
- 5-25 Int. Labortendaro, Kennemerduinen, Ned.
- 10-30 Int. Junulara Renkontiĝo, apud Latino, Ita.
- 10-31 Int. Labortendaro, apud Romo, Ita.
- 12-26 Kulturaj kaj Turismaj Ferioj, Grésillon
- 13-23 Int. E-Seminario, Szeged, Hungarujo
- 15-25 Int. Turista Renkontiĝo, Szeged, Hun.
- 17-30 2a Int. Balatona E-Ferio, Balaton, Hun.
- 18-23 30a Hispana Kong., Mieres
- 18-28 Int. Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hun.
- 18-31 Int. E-Ferioj por Mezlernejanaro, Torun, Pol.
- 19-26 Int. Feriaj Kursoj, Helsingör, Dan.
- 22-26 Usona Kongreso, San Francisco
- 22-25 Int. Kulturfestivalo, Bialystok, Pol.
- 24-31 Komuna Kong. de Kristanoj kaj Katolikoj
- 25-26 57a Japana Kong., Osaka
- 25-31 6a Int. Seminario, Torun, Pol.
- 25-31 43a SAT-Kong., Augsburg, Ger.
- 26-9/8 Esperantaj Studoj, Grésillon, Fra.
- 28-31 Instruista Int. Konf., Maribor, Jug.

Aŭgusto

- 1-7 Int. Feriosemajno, Kniebis, Ger.
- 1-8 55a Universala Kongreso, Vieno;
11a Int. Infankongreseto, Vieno, Aŭstrujo
- 1-8 Int. Kong. de Blindaj E-istoj, Vieno
- 3-22 3a Int. E-kurso, Pamporovo, Bul.
- 8-9 3a Ornitologia Semajnofino, Rust, Aŭstrujo
- 8-10 Postkongreso de 55a UK, Linz, Aŭstrujo
- 8-15 Postkongresa ekskurso al Bad Hofgastein, Aŭstrujo
- 9-11 Postkongresa ekskurso al Praha, Ĉeĥ.
- 9-11 Postkongresa ekskurso al Budapeŝto, Hun.
- 9-14 Postkongresa rondvojaĝo tra Aŭstrujo
- 9-30 Kulturaj Semajnoj en Grésillon
- 10-17 26a Int. Junulara Kongreso, Graz, Aŭstrujo
- 10-30 Int. Labortendaro, Stockholm, Svedujo
- 17-30 Int. Studenta Laborbrigado, Torun, Pol.
- 23-29 12a Eŭropa Feriosemajno, Gwatt, Svi.
- 23-29 Seminario por gvidantoj de TEJO, Ned.
- 24-12/9 3a Int. E-kurso, Pamporovo, Bulgarujo
- 29-30 Tutlanda E-Renkontiĝo, Covasna, Rumanujo
- 29-5/9 "7 Feriotagoj en Nederlando", Zwolle, Ned.

Septembro

- 18-1/10 6a Int. Ferio, Miedzygôrze, Pol.
- 19-26 41a Itala Kong., sur ŝipo "Caribia"

Oktobro

- 18-24 Aŭtunaj Feriaj Kursoj, Aarhus, Danlando
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj
- 31-1/11 Jarkunveno de Finna E-Asocio, Jyväskylä

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (L.L.Z. naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 27-3/1 6a Int. Feriosemajno, Bialowieza, Pol.
- 31 Kotizoj de 56a Universala Kongreso altiĝas

Februaro

- 21-27 Semajno de Internacia Amikeco



TEJO-redaktoro: Wim Jansen, Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen, Nederlando

SEMINARIO SEN PRELEGOJ

La 14-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo traktos film-arton

Germana Esperanto-Junularo decidis okazigi la 14-an Internacian Seminarion de 27.12.1970 ĝis 3.1.1971 en la moderna junulargastejo de Ulm, apud Danubo en sudokcidenta Germanujo. Tiu 14-a IS iusence daŭrigas la temaron de la 13-a: arto en la plej vasta signifo. En Ulm tamen estos io neordinara, ĉar oni antaŭvidas prezenton de pli ol 30 (tridek!) filmoj. La seminaria temo estas: "la rolo de la moderna specife mallonga filmo".

La organizantoj planas diskutigi la seminarianojn pri filmoj kiel "Kiel oni havos bonkonduktan infanon" (ĉeĥa), "Guernica" (franca), "La sekreta formulo" (meksika), "Vitro" (nederlanda), "Kolortimo" (belga), "La ludo" (jugoslavia), "La helikoj" (franca), "Nokto kaj nebulo" (franca), "Persikoj" (brita), "Aŭtuno de la hipioj" (fr-germana). Post la prezento de la filmoj okazos diskutoj pri la aspektoj forma kaj enhava de la filmoj.

Oni klopodas pri la kutimaj kromprogramoj, kiel ekstertemaj diskutoj, vizito al la urbo, malseka akcepto ĉe la urbestro, jarfina balo kaj ekskurseto. La kotizoj, kiuj inkluzivas ĉiujn tranoktojn, manĝojn kaj programerojn, varias inter 75 kaj 100 germanaj markoj, depende de la aĝo kaj aliĝdato de la partoprenanto. Gejunuloj sub-25-jaraj havos la konatajn altegajn subvenciojn. Detalajn informojn kaj aliĝilojn liveras la sekretario de la Konstanta Komitato de la Internaciaj Seminarioj, Uwe Joachim Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, F.R. Germanujo.

KLUBO POR PLI JUNAJ ESPERANTISTOJ

La kastora Klubo de Esperanto, jam prezentita en la junia numero (p. 94), estas speciale por junaj homoj ĝis-16-jaraj. Se vi mem, iu amiko aŭ konato via estas ne pli ol 16-jara, ĉi tiu artikolo interesos vin! Aneco de la Kastora Klubo estas senpaga, sed aliĝanto devas lerni parkere kaj ripeti al sia instruisto la jenan trioblan promeson: "Mi promesas diligente lerni Esperanton"; "mi promesas ĉiam porti la verdan stelon"; "mi promesas ĉiam konsideri alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso, koloro aŭ kredo li estu."

Poste necesas, ke la instruisto certigu al la Ĉefa Kastoro (adreso ĉi-sube), ke vi plenumis tiun kondiĉon, kaj citu vian naskiĝdaton, kaj vi ricevos atestilon de aneco kun la rango de **kastoreto**. Post tio vi povos, plenumante pluajn kondiĉojn, atingi la pli altajn rangojn, kiel vi jam legis en la junia numero.

Do, se vi estas ne pli ol 16-jara, eble la Kastora Klubo taŭgas por vi. Aŭ eble vi konas iun junulon, kiu trovas intereson en klubo por pli junaj esperantistoj. Kial ne tuj lerni la promeson? Poste petu vian instruiston skribi al la Ĉefa Kastoro, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester M31 1PS, Britujo, certigante, ke vi plenumis la kondiĉojn por esti kastoreto. Aliĝu nun!



BICIKLE AL VIENO!

Kvar entuziasmaj skoltoj, sur la bildo de dekstre maldekstren Klaus, Eckehard, Gerhard kaj Manfred, planas biciklan vojaĝon al la Universala Kongreso en Vieno. Ili startos en julio en Neustadt (F.R. Germanujo) kaj pasante tra Munkeno kaj Salzburg atingos Vienon, kie ilin atendas plena semajno da distraĵoj, ekskursoj kaj renkontiĝoj kun aliaj skoltoj. Ni deziras al ili bonan vojaĝon kaj agrablan restadon en Aŭstrujo!

ESPERANTO EN RADIO



Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1969, Unua Parto, p. 521. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.30-06.00 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.

15.30-15.55 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 31.50 m (9525 kcs).

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs), 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.00-12.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), L.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua Sao Bento 245, Sorocaba (Sao Paulo), Brazilo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.

18.00-19.00 Sherbrooke, 102.7 Mcs (mod. frekv.). I. Le Globe Trotter, Radiostacio CHLT, 3330 ouest rue King, Sherbrooke (Québec), Kanado. (Kvarlingva programo pri turismo).

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K.

12.15-12.25 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.

18.15-18.30 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (kelkaj programeroj en la angla).

Merkredo

12.15-12.25 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).

13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).

23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

21.45-21.55 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), P. (D-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs) - P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Vendredo

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 (mod. frekv.)

K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergorvia, F-63-Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 48 m, 45 m, 42 m, 38 m.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fé), Argentino.

20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj: — dana merkrede inter 15.30 kaj 15.55 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), la saman tagon inter 19.30 kaj 19.55 per ondoj 48.90 m (6135 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.01 m (9675 kcs), per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs); — germana ĉiutage inter 07.00 kaj 07.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 41.18 m (7285 kcs); — sveda marde kaj vendrede inter 20.30 kaj 21.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.27 m (7270 kcs), 41.18 m (7285 kcs), merkrede kaj sabate inter 05.00 kaj 05.30 per ondo 31.45 m (9540 kcs).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urbo): Clermont-Ferrand, Muritiba, Rosario, Sherbrooke, Stoke-on-Trent, Sorocaba, Valencia;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (48.66 m, 31.46 m), Bilbao (aŭdebla en sudokcidenta Eŭropo), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Warszawa, Wien (aŭdebla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio: Pekino, (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

d) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (25.60 m, 25.28 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera situacio, lokaj kondiĉoj diversspecaj.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 436, 1 junio 1970

POR LA PRESEJO DE UEA

Kolektitaj okaze de la Sveda Kongreso en Jönköping 1100,35 sv.kr. aŭ 764,19 gld.; kolektitaj okaze de la kursfina festo en Kopenhago 736,60 danaj kr. aŭ 351,36 gld.; donacitaj de d-ro M. E. Falla, Britujo, 35,— gld. Ĝis nun entute pli ol 8100,— gld.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de septembro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Brazilo: Mauricio F. de Castro (FD), Belo Horizonte; Hans H. Urvat, Chapada dos Guimaraes; Adonai de Medeiros (FD), Fortaleza; Manoel Garcia, Sorocaba; Germano Braga (FD), Tupi Paulista; M. F. de Castro, Viçosa. **Britujo:** David Wild, Crewe; Brian Philips (FD), Ipswich; John Rapley (FD), London; George Carr, Newcastle-upon-Tyne; Margaret Jackson, Stonehouse; John Brownlee (FD), Upminster; Dermot Quirke, Wandsworth.

Ĉeĥoslovakio: Frantisek Patera (FD), Horice; Ladislav Spína, Liberec; Stanislav Bartovic, Piestany. **Danlando:** Mogens Andersen, Espergaerde; P. Bo Larsen (FD), Fredericia. **Finnlando:** Lauri Vuolo, Lohja; Raija Pehkonen (VD), Mikkeli; Antero Harju, Virrat. **Francujo:** Renée Volpeliere, Nîmes; Marie-Ange Briand (FD), Saint-Brieuc; Claude Hervé, Wittenheim. **Hispanujo:** J. Geli Granolleras, Flassá. **Nov-Zelando:** Joyce Goodwin (FD), Dargaville; Francis Tocker (FD), Whangarei. **Rumanujo:** Ioan Sirbu, Brasov; Jenő Zágoni, Covasna. **Sovetunio:** Kalju Lillepuu (FD), Viljandi. **Sudafriko:** Cobus Zeelie (JD), Uitenhage. **Usono:** Toma Stevanovic, Hopewell Junction; Walter Murawski (FD), Jersey City; Joseph Gamble, Salem; Gretchen Doris (FD), Tampa.

Antaŭ 50 jaroj

— en "Esperanto", n-ro 7-8, 1920

Teatra arto ĉe kinematografo. "Oni fondis lastatempe ligon por kontraŭbatali la malmoralajn, stultajn kaj malsprite sentimentalajn filmojn. Necesus krei ankaŭ asocion por la defendo de la teatra arto ĉe la kinematografo!"

Decidoj de la Komitato de UEA. La Komitato, post esploro de detala raporto al ĝi sendita dum majo, decidis interalie:

- "Akcepti kun plej varma danko al s-ino Hodler la transdonon de la esperantista havaĵo de ŝia edzo al UEA kaj la belegan kapitalon, kiun nia kara prezidanto testamente destinis al nia Asocio."
- "Elekti kiel redaktoron de nia gazeto 'Esperanto' d-ron Edmond Privat en Ĝenevo."

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1970)

Aŭstrujo: St. Pölten (VD); Wien (VD). **Belgujo:** Antwerpen (FD aŭtoj); Gent (FD instruado). **Francujo:** Aix-en-Provence (FD ekonomio); Angers (FD religio); Aubenas (FD); Briançon; Chaponost; Draguignan; Glandage; Luçon; Marseille (FD komerco); Orleans (FD); Peronne; Villeneuve. **Germanujo:** Hannover (VD); Herford; Unterlüss. **Hindujo:** New Delhi (FD religio). **Hispanujo:** San Feliu de Llobregat. **Hungarujo:** Budapest (FD veterinaraj aferoj). **Islando:** Reykjavík (D); Vestmannaeyjar (D). **Israelo:** Tiberias. **Italujo:** Albano; Minnella (JD); Bolzano (D kaj FD); Piacenza. **Japanujo:** Hirosaki. **Kanado:** Montreal (FD). **Nederlando:** Amsterdam (VD kaj JD); Heemstede; Hilversum (VD). **Usono:** Waterman.

LA CENTRA OFICEJO estos fermita

de la 30-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto, inkluzive, pro libertempoj kaj pro deĵorado en la Universala Kongreso en Vieno. Vizitontoj al Rotterdam bonvolu tion noti por eviti vanan veturon. Dankon!

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nagata, f-ino Akiko, Rotterdam, Nederlando.
Weber, f-ino Elisabeth, Bann, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

234 Brandemar, s-ro Nils; 235 Johnsson, s-ino M.; 236 Julin, s-ro T., Svedujo.

DONACOJ (Gld.)

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Germanujo: Schmidt, s-ro Georg, 7,13.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Germanujo: Christaller, f-ino, 200,—.

Patrono A de TEJO: Italujo: Terrazzini, s-ino L. Svedujo: Almén, s-ro Paul.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

LI VARBIS DEK SEP!

Jam malaktualiĝis nia artikolo pri la varb-agado de s-ro Walter Kaukal en Neustadt/Weinstr., FR Germanujo. Sed ni ne plendas pri tio. La informojn malaktualigis s-ro Kaukal mem, varbante intertempe k v a r pliajn dumvivajn membrojn por UEA! Dankon kaj gratulon!

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

"Frua majmateno": mezepoka poezio nederlanda. Samepokaj ilustraĵoj. 16 p. 2,50 n.gld. al nederlanda poŝtĉekkonto 1505865: Vulpolibroj. Aŭ libroservoj.

Serĉas Volapük-, Interlingua-konferenco-foton. Donas interŝanĝe Esperanto-, Ido-kongresajn fotojn. Intereso pri Ruĝa Kruco, mondopaco, mondlingvo, filatelo. E. Anderegg, Fischerweg 7, CH-9326 Horn am Bodensee, Svislando.

Institucio Hodler 68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio estas fondita en 1968 por plisolidigi la finanĉan bazon de UEA. Detalojn informas la administrantino: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Ĉarmaj kurso-finintinoj ĉe la ŝtata teknika lernejo de leĝera industrio en Tallinn, Estonujo, deziras korespondi. Volontuloj bonvolu skribi al: Esperanto Ring, Kergetööstuse Tehnikum, Imanta 3, Tallinn, Estonujo, Sovet-Unio. (Vidu la foton ĉi-sube.)



Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, kvanton kontraŭ kvanto. H. Van der Mast, Velodroomstraat 2, B-2600 Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Sinjorino Angela Sicart, vidvino de doktoro Mariano Solá Montserrat, kaj ŝia familio sincere dankas al ĉiuj gesamideanoj, kiuj el diversaj landoj sendis kondolencajn esprimojn okaze de la forpaso de ŝia amata edzo en Tarrasa (Barcelona) la 14an de februaro 1970 je la 74a jaraĝo. Al ĉiuj korajn dankojn!

Privat en libro "Vivo de Zamenhof" rakontas: "Eĉ pli juna Zamenhof jam verkis versojn en la rusa lingvo." Poemon al hebrea li presigis "Russkij Jevrej". En libro estas traduko de poemo. Sokolov, redaktisto de hebrea gazeto "Hacefira", en interparolo kun I. Olsvanger diris, ke poemoj de Zamenhof estis la plej belaj poemoj, kiujn li iam legis en la rusa lingvo. Alsendintoj de menciita L. Zamenhof-poemo en la rusa lingvo el iu juda gazeto ricevos ĉiuj kune 100 gld.; alsendintoj alian poemon de L. Zamenhof ricevos ĉiuj kune 50 gld. Por poemoj necesas fotokopioj de tuta titolpaĝo de numero de gazeto kaj de tuta paĝo, sur kiu estas presita poemo. Limdato por alsendo de fotokopioj per aerpoŝto estas 31 decembro 1970 (poŝtastampo de sendloko). p.a. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Ulenŝpieghel: mezepokaj lignogravuraĵoj, ŝerĉheroaj rakontoj. 16 p. 2,00 n.gld. al nederlanda poŝtĉekkonto 1505865: Vulpolibroj. Aŭ libroservoj.

Pacesploro. Konflikologio. Kurso oktobro 1970 — junio 1971. Angla/Esperanto. Informoj: W. F. Pilger, Hesbjerg-Kolegio, DK-5573 Holmstrup, Danlando.

Vegetaranoj! Kion vi pensas pri fakkunveno en la 56a U.K. en Londono? Skribu al C. Fettes, Saint Columba's College, Dublin 14, Irlando. (Mia kongresnumero en Vieno estas 290).

Vegetaranoj! Mi siatempe promesis al s-ano Havkin, transpreni la gvidadon kaj reeldonon de "Vegetarano", organo de Tutmonda Vegetarana Asocio (TEVA). Tiun promeson mi devas plenumi, tio ja estas eĉ devo de eks-skolto. Bonvolu anonci vian adreson al: Ernesto Vana, Dudince (Zvolen), Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

Mi kolektas naciajn kaj internaciajn kongreslibrojn. Kiu povos helpi min? S-ro R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Per pk. aŭ letero vi povas peti enkondukon de Esperanto en la tutmondan programon de Sveda Radio, precipe se vi loĝas en Jugoslavio, Israelo, Japanujo aŭ Pollando. Proponu programon duonhoran ĉiusemajnan kaj menciuj preferatan temon. Referenco: "Inter — Agadgrupo por Esperanto". Jen la adreso: Radio de Svedujo, Eksterlanda Programo, S-105 10 Stockholm, Svedujo.

Finanĉhelpo (aŭ eldonisto) serĉata por eldoni klasifikitan vortaron necesan por lingvo-instruisto kaj lernantoj. Esperanto, angla, franca kaj hispana partoj pretaj. Alia(j) lingvo(j) aldoneblas. Skribu al: A. Hryniewicz, San Carlos 44, Santos Lugares-GSM, Argentino.


Helpu nin krei porstudentan kurson, sendante leterojn, poŝtkartojn, korespondpetojn kaj materialojn: Esperanto-kurso, Faculdade Direito, Natal/RN, Brazilo. Respondo garantiita.

Poŝtmarkoj — interŝanĝo. Skribu al: Box 69 St. Kilda, Vic. 3182, Aŭstralio.

S-ro Pierre Delaire, direktoro de "Espéranto-Office", B.P. 901, F-45-Orléans, Francujo, serĉas por siaj multaj diversaĝaj parolaj kaj skribaj gelnantoj (inter 12- kaj 70-jaraj), ĉiulandajn seriozajn gekorespondantojn. Ne respondos, sed transdonos la leterojn. Skribu aĝon, profesion, ktp.

Mi serĉas amikojn por korespondi pri naturo, psikologio, ktp. Reciproka vizito eble. Fraŭlo Xaver Willimann, 42-j., 53, av. d'Aire, CH-1203 Genève.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.



(grandformata — 30 x 43 cm. 8-paĝa, monata; jarabono DM 10.— aŭ egalvaloro) Presita, kuntempe redaktata.

Enhavas krom artikolojn pri aktualaj mond-problemoj ankaŭ informojn el la Movado, felietonon, spegulon de la E-gazetaro, humuraĵojn, rubrikon por ŝakamantoj kaj enigmuloj, anoncetojn kaj reklamojn.

La gazeto, kiu estas alia!

Ne prokrastu peti senkoston provekzempleron de la redakcio kaj eldonentrepreno:

LANTERNO, D-8 München 25, Postfach 473, F.R. Germanujo

En 1970 aperos:

ABZ de Amo

de la danaj verkistoj Inge & Sten Hegeler.
La plej vendata libro de sia speco en Danlando — enciklopedio pri la kunvivo de plenkreskaj homoj — verkita por plenkreskaj homoj. Petu senpagan prospekton ĉe la eldonejo. Reduktita prezo je antaŭmendo.



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando

MOVADO por MONDUNIO

La Esperantista Sekcio de la agadgrupo "Wereldunie", la WBN ("Werelduniebeweging Nederland") kaj la "Emergency Committee for World Government" (ECWG).

Ĉiu, kiu sendos al ni minimume 2 respondkuponojn aŭ egalvaloron, ricevos nian ilustritan kompendion pri mondestrareco kun esperantigita teksto. Skribu al:

'MpM', Fondaĵo UNICENT, Meidoornstr. 69a,
Zaandam, Nederlando. (pĉk. 1.607.507)

ESPERANTISTA BONFARECO

"Mi esperas, ke la esperantista movado estos tiel forta, ke ĝi altiros en ĉiuj landoj multajn junajn homojn, kiuj ne nur estas idealistoj kaj entuziasmaj pri la granda ideo de internacia interkompreniĝo, sed ankaŭ **tiel praktike agantaj**, ke ili gajnos per praktika aplikado de Esperanto multajn amikojn, kiuj poste kunhelpos por vasta prospero de Esperanto."

Min apogante sur ĉi tiuj gravaj vortoj de la prezidanto de Aŭstrujo kaj alta protektanto de la 55-a UK en Vieno, d-ro Franz Jonas, amike kaj frate mi invitas vin konsideri kaj iamaniere imiti la bonfarecan ekzemplan de prof-ino Norma Dell' Aringa, delegitino de UEA en Mantova, Italujo, kiu ne nur persone helpas la konstruotan

"PAVILONON DE ESPERANTISTA FRATECO" en Madras, Hindujo, sed ankaŭ senpage instruas Esperanton, kondiĉe ke oni kontribuu al la porleprula fonduso **dum ĉi tiu tria jaro — 1970 — de ĝia kvinjara plano.**

Ĉar la evoluo estas la nova nomo de la paco, ankaŭ vi bonvolu sendi ian ajn monoferon al la kasisto de la porpavilona fonduso:

D-ro Cesare Ferrari, Viale dei Mille, 37, I-20129 Milano, Italujo. (Poŝta ĝirkonto 3-7791, porleprula pavilona fonduso)

aŭ, se vi volas, rekte al iniciatinto:

Sac. Petro M. Urbaitis S.D.B., Lituani Don Bosco, Via Colonna 2, I-00044 Frascati, Roma.

Ramona van Dalsem kantas himnon de la amikeco DONU AL MI VIAN MANON...

Toos Schoonman akompanas plane.

Aliaj kantoj sur tiu stereofona disko (45 t/m, ankaŭ monofone ludebla): "La eĥo", "La letero", "Printempo". Originalaj esperanto-kanzonoj laŭ tekstoj kaj melodioj de Ramona van Dalsem. La akompanaĵojn faris Toos Schoonman kaj Kees Olthuis.

Prezo 5,75 gld. (En Nederlando bv. aldoni 12% pro la spez-imposto). Mendebla ĉe UEA (aŭ rekte ĉe R. v. Dalsem, Bussumsestr. 18, Den Haag, Nederlando). Aldonu sendokostojn 10%.

KURS-GVIDANTOJ

Kiel facilan legolibron por daŭrigaj kursoj ni tre rekomendas al vi la libron **SEKRETOJ DE LA MARESTAĴOJ**. Ĝi pritraktas populare la tre diversajn vivaĵojn de Adriatiko, kaj ĝiaj mallongaj ĉapitroj kaj abundaj ilustraĵoj prezentas intereso-kaptan materialon por la instruado.

Je la prezo de po 5,— gld. ni donas rabaton 33-procentan al ĉiuj, kiuj mendas minimume 3 ekzemplerojn! Aldoniĝas sendokostoj 10%.

Libroservo de UEA

ARABAJ MAKSIMOJ DE LA SEPA JARCENTO

Kaj Aliaj Diversaj Maksimoj

77 paĝoj, 19½ x 13½ cmj.

Trad. Husen Al-Amili

Prezo: 3,90 gld.

+ sendokostoj 10 %, mendebla
ĉe la Libro servo de UEA.

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.

Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkoto. Ĝi estas sendata al
tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras ofer-
donon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj
interesiĝas pri la internacilingva problemo. Faci-
ligu la atingon de alta nombro da aŭtoritatuloj kaj
lernejestroj en ĉiuj lokoj.

Klopodu regajni perditajn samideanojn!

Ekzistas multaj dekmiloj da itallingvoparolantoj, kiuj ne
ricevas plu novaĵojn pri la esperanto-vivo. Klopodu regajni
ilin al la esperanto-movado per tre malalta elspezo (it. L.
250).

**Adresu : La Lingua Internazionale ESPERANTO,
(Direttore: Corrado Cerri)
Casella Postale 159
I-13051 BIELLA (Vc)**

P&K: Corrado Cerri, n.5-742, I-13051 Biella (VC).

La Monda Lingvo-Problemo

SOCIA-LINGVISTIKA-PSIKOLOGIA-EKONOMIKA-JURA-POLITIKA

Redakta Komitato: C. J. Adcock, P. Ariste, G. Bárczi, C. C. Berg, E. A. Bokarev, A.
Capell, V. Georgiev, I. Lapenna, B. Migliorini, M. Pei, G. Waringhien, E. Wüster.

Redaktoro: V. Sadler

Vol. 2

1970

N-ro 5

PAUL NEERGAARD

Suggestions regarding the international standardization of translatable
names of cultivars

PAUL ARISTE

Die Wege des Aussterbens zweier finnisch-ugrischer Sprachen

IVO LAPENNA

The common language question before international organizations

GUY HERAUD

Pour une solution du problème ethnique

WERNER BORMANN

Das Sprachenproblem in den europäischen Institutionen

Plus notoj kaj ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldonas:

Mouton & K-io, Hago-Parizo

Sub aŭspicio de CED.

Jarabono (3 x 64 paĝoj): 25 gld.; \$ 7; £ 2.18.0; Fr. Fr. 39,—; DM 25,75